der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

20. Jahrgang | Nr. 128 (6/1984) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Zamenhof

La tutan tempon, super Esperanto,
kun sinofer' patrino kaj mesia,
li ŝvitis: ĝin li, konstruist' magia,
masonis; liaj ŝultroj de giganto
el vortminejo, en preciza kvanto

sin servi, ke ĝi staru rektlinia!
Li vivis ĝin; eĉ vivo profesia
sin ŝovis al li, en deviga hanto!

Ĉar, dediĉinte sin al la kuraco
okula, novan lumon li liveris
al blindaj, dum la tuta tag', sen laco!

Kaj nokte, per tradukaj proz' kaj verso,
kaj per originalaj, li konkeris
spiritan lumon por la universo!

Geraldo Mattos



Fritz Wollenberg

La humanisma mesaĝo de Zamenhof

Okaze de la 125-a naskiĝtago de la iniciatinto de Esperanto, 15. 12. 1984

Okaze de la 35a datreveno de la fondo de nia respubliko ni bilancis la atingaĵojn de la reala humanismo en GDR. Se ni bilancas 40 jarojn da paco en Eŭropo, se ni bilancas la forigon de ekspluatado, de rasismo, ŝovinismo kaj militarismo el la vivo de la popoloj en socialismaj landoj, ni bilancas realigitajn humanismajn valoraĵojn, pri kiuj humanistoj de post jarmiloj revis kaj por kies efektivigo ili agadis. Unu el tiuj humanistoj estis la kreinto de la internacia lingvo Esperanto, la iniciatinto de la burĝa demokrata Esperanto-movado — Ludoviko Lazaro Zamenhof.

La 125a datreveno de la naskiĝo de li en decembro de 1984 estas por ni okazo demandi: Kiujn ideojn de la fondinto de nia lingvo ni esperantistoj realigas en GDR, pli aŭ malpli modifitaj? Mi sekve volas klarigi iomete nur kelkajn.

Multnombro da libroj kaj artikoloj naci- kaj esperantlingve ĝis hodiaŭ aperis pri Zamenhof. Eminentuloj de la Esperanto-movado kiel Edmond Privat[1]), Gaston Waringhien[2]) kaj Marjorie Boulton[3]), kaj Ernest Drezen[4]) skribis pri Zamenhof. Ni konas biografiojn de la polino Maria Ziołkowska[5]) kaj de la japano Ito Kanzi[6]), artikolojn de Maimon[7]), Holzhaus[8]) kaj Murgin[9]). La listo ne estas kompleta.

Iliaj pensoj kaj konkludoj estas tre diversaj. La marksisma pensmaniero de Drezen kaj Murgin memkompreneble kondukas al tute alia Zamenhof-bildo ol tiu de burĝaj aŭtoroj, sed ankaŭ la Zamenhof-bildo de la burĝaj aŭtoroj diferencas evidente. Kial tiaj diversaj aŭtoroj kun absolute diferencaj aŭ eĉ kontraŭaj mondkonceptoj povas nodiĝi al la idearo de Zamenhof? Mi opinias, ke tio okazas eble pro la kontraŭdiroj en la pensado de Zamenhof mem.

En la jaro 1905 Zamenhof skribis leteron al Michaux, en kiu la 46-jarulo konfesis: „... interne en mi konstante bataladis reciproke diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj“[10]). Tiuj internaj kontraŭdiroj memkompreneble kreskis el la sociaj kontraŭdiroj. Białystok kaj Varsovio, kie Zamenhof travivis la plej grandan parton de sia vivo, situis en tiu parto de Pollando, kiun la rusa carismo regis. La tempo, en kiu li maturiĝis al viro — la 70-aj ĝis 90-aj jaroj de la pasinta jarcento — estis tempo de rapida evoluo de kapitalismo fine transiranta al imperiisma stadio. Zamenhof rigardis tiun evoluon el la vidpunkto de etburĝa intelektulo. Lia patro, instruisto de lingvoj, ne edukis la filon al batalo kontraŭ la carisma subpremo. Li sekvis la ideologion de pozitivismo, kiu en la liberala periodo de la burĝaro de Pollando estiĝis kaj ankaŭ influis la kreinton de Esperanto. Post la malvenko de la januara ribelo de 1863 la burĝaro kaj la liberala intelektularo konsideris la batalon kontraŭ la subpremantaj eksterlandaj potencoj senperspektiva kaj volis akiri la renesancon de la pola nacio per laboro,

ŝparemo kaj klerigo. Progresemaj estis iliaj postuloj superi posttempecon kaj obskurantismon, restaĵojn de la feŭdaj institucioj kaj antaŭjuĝoj, batali kontraŭ la longe enradikiĝinta pensmaniero de Ŝlahta kaj de klerikalismo kaj ankaŭ kontraŭ la diskriminacio de la judoj. Progresema estis ankaŭ ilia propagando por la samrajteco de la virinoj, por la prosperigo de la ĝenerala klerigo, por scienca kaj teknika progreso.[10a])

En la pensado de Zamenhof ni retrovas tiujn progresemajn pensojn. Ne estas hazardo, ke Zamenhof tradukis el la pola lingvo esperanten verkon de Eliza Orzeszkowa, eminenta reprezentantino de la pozitivismo en la pola literatura. Temas pri la romano „Marta", kies centra problemo estas la emancipado de la virino. Ankaŭ la aliaj de Zamenhof esperanten tradukitaj verkoj ebligas konkludojn pri la radikoj de la pensado de li. 7 jarojn post la apero de la unua lernolibro li eldonis sian tradukon de la Shakespeara dramo „Hamlet". La humanisma mesaĝo de tiu dramo estas mesaĝo, kiu evidentigas ankaŭ la strebadon de la tradukinto al humanisma agado. La kontraŭdiron inter la idealaj potencoj de la homo kaj la stato de la mondo[11]) Zamenhof sentas en sia tempo same kiel la heroo de tiu dramo siatempe. La strebadon de Hamlet al humanisma agado, liajn dubojn kaj limojn ankaŭ sentis Zamenhof, krome li sentis lian ageman optimismon. De kie venis la optimismo pri la solvoj de tiuj kontraŭdiroj en tempo, kiam la imperiismo regis la mondon? Unu fonto, el kiu Zamenhof ĉerpis sian historian optimismon, estis la klasika burĝa literaturo kaj filozofio. La kredo al la morala forto de la homo kaj al lia prudento neniam forlasis lin. De post sia plej frua aĝo li observis la malamikecon inter la naciecoj. Li travivis terurajn progromojn kontraŭ la judoj. Li vidis, ke oni malpermesis al la poloj uzi sian lingvon en lernejoj. Li travivis kiel kruele la rusa carismo subpremis la revolucion de 1905, kaj esprimis profundan solidarecon al la viktimoj de la carisma politiko dum la Ĝeneva kongreso 1906 per jenaj vortoj: „Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalos por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homoj."[12])

La ĉefa demando en la tiama Pollando estis la nacia demando, kaj pri solvo de tiu demando ankaŭ pensis Zamenhof. Li proponis kiel solvon la faciligon de la interkompreniĝo per internacia lingvo. Montriĝas la idealisma koncepto de Zamenhof, se li nomas la lingvon „la ĉefan motoron de la civilizacio" dank al kiu „ni altiĝis super la bestoj". Tiun troigon de la rolo de lingvo li dumvive ripetas, sed en lia spirita evoluo videbliĝas realismaj pozicioj. En lia traktaĵo por la kongreso de rasoj 1911 li esploris la kaŭzojn por rasismo kaj ŝovinismo. Li nomis diversajn „malpacojn, kiuj regas interne de ĉiu lando kaj gento, kiel ekzemple malpacoj politikaj, partiaj, ekonomiaj, klasaj k. t. p.".[13]) Estas interesa spirita laborrezulto por li kiel burĝa intelektulo ekkoni tiujn malpacojn, kvankam li ne akceptis ilin kiel ĉefajn kaŭzojn de la rasismo. La dua spirita avantaĝo estas lia provo klarigi la diferencojn inter la rasoj kaj gentoj historie kaj ne kiel fiksitaj en la homoj. Li skribis: „... se ni apartigos la cirkonstancojn de tempo, loko kaj religio — ĉu la mensoj de tiuj afrikano, aziano kaj eŭropano ne aperos al ni tute egalaj?"[14]) kaj aliloke: „Ĉiuj paroloj pri deveno kaj hereda sango estas nur frazoj kaj pretekstoj ..."[15]) Tiuj realismaj tendencoj de Zamenhofa pensado havis progresemajn praktikajn rezultojn.

En la jaroj antaŭ la 1-a mondmilito, kiam grandparte en la burĝaro de diversaj landoj regis ŝovinismaj kaj militarismaj konceptoj la de Zamenhofaj pensoj influita pacifisma Esperantomovado kondamnis rasismon, ŝovinismon kaj militarismon. Tamen Zamenhof ne ekkonis la ekonomiajn, politikajn kaj klasajn kontraŭdirojn kiel la ĉefajn kaŭzojn de naciismo kaj militarismo. Montriĝas samtempe grandeco kaj klasa limigiteco de lia pensado.

La de li iniciatita lingvo, kvankam ĝi ne kapablas malebligi militojn, vere

faciligas la interkompreniĝon. Per la kreado de Esperanto Zamenhof sekvis malnovan humanisman tradicion. Humanistoj kiel Komensky kaj Leibniz pritraktis la problemon de internacia lingvo. Zamenhof, kiu alproprigis al si 12 lingvojn 3 el ili li libere parolis pripensis ĉiujn eblecojn krei internacian lingvon. Jam en gimnazio lin allogis la ebleco revivigi unu el la antikvaj lingvoj, sed li konvinkiĝis, ke iliaj gramatikoj estas tro komplikaj. Li komencis revi pri nova, pri artefarita lingvo. Unue Zamenhof verkis tute elpensitan lingvon. Sed la provo kun si mem montris al li, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj memorigeblaj. La nun estiĝinta lingvo baziĝis sur la vortmaterialo de naciaj lingvoj, prefee jam internaciaj vortoj.[16]) Mi ne volas skizi la principojn de la lingvokreado de Zamenhof, mi nur konklude volas konstati, ke tia lingvokreado supozigas, ke Zamenhof rigardis la lingvon ne kiel donacaĵon de Dio, sed kiel socian fenomenon, farebla kaj ŝanĝebla de la homo. Ankaŭ ĉi tiu penso de Zamenhof enhavas realismon kaj translimas lian idealismon. Denove ni retrovas la fidon al la forto de la homo kaj aktivigan koncepton, kiu inkluzivas ankaŭ la uzadon de la lingvo en la servo de la socia progreso.

Zamenhof surprizis siajn adeptojn dum la kongreso en Boulogne-sur-Mer per la deklamo de originale verkita poemo. Ne estis la unua, sed surprizis ĝia mistikismo. Mi nur citas la unuan strofon:

Preĝo sub la verda standardo

1. Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
   Fortego, la mondon reganta,
   Al Vi, granda fonto de l'amo kaj
   vero
   Kaj fonto de vivo konstanta,
   Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
   Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
   Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas,
   Hodiaŭ ni preĝas.

En tiu poemo sin anoncas lia instruo pri homaranismo, kiun la esperantistoj ne transprenis. Tiu instruo estas la provo subordigi la religiojn sub ĝenerale homaj humanismaj principoj. Li proponis, ke „ordono de Dio mem estas tio, kio estas enskribita en la koro de ĉiu homo".[17]) En la kongresparolado en Boulogne-sur-Mer li klarigis, ke li preĝas al „tiu alta morala forto, kiun sentas en sia koro ĉiu homo". Klariĝas, ke li ne turnas sin al iu Dio, li fidas al la morala forto de la homo. Tio estas idealisma koncepto, sed esprimas profundan humanismon, ĉerpitan el la koncepto de la burĝa ideologio en ĝia progresema tempo, direktitan kontraŭ malhumanismaj tendencoj de la imperiismo.

Ofte oni aŭdas la aserton, ke Zamenhof estis sennaciulo. Mi pensas, ke tio ne estis ebla. Mi volas mencii unu pruvon, ke li plene estis enradikiĝanta en sia popolo. Li nur tradukis du samtempajn verkistojn esperanten, de la jam menciita polino Eliza Orzeszkowa kaj de la jida verkisto Scholem Alejchem, kiu prefere skribis pri la vivo de la orientjudoj. Zamenhof per tio sin konfesis al sia deveno pola-juda. Kelkfoje li parolis pri sia patriotismo. En la Deklaracio pri Homaranismo li skribis en 1913: „Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kian ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas. La servadon speciale al la interesoj de unu gento aŭ la malamon kontraŭ alihejmuloj mi neniam devas nomi patriotismo."[18]) Patriotismo kaj internaciismo por Zamenhof ne estas kontraŭaj aferoj. Ago por la interesoj de la propra popolo devas inkluzivi agadon por interesoj de la tuta homaro. Por li estis kontraŭaĵoj naciismo kaj patriotismo. Kaj vere, en lia tempo evidentiĝis, ke la naciismo ne nur damaĝas al aliaj popoloj sed ankaŭ al la propra popolo. Nuntempe ni povas observi la saman. La USNONa naciismo kontraŭas la interesojn de la tuta homaro same kiel la interesojn de la propra popolo. La politiko de konfrontado kaj vetarmado ankaŭ nin minacas. Sed hodiaŭ la pacaj fortoj, aliel ol en la tempo de Zamenhof, estas pli fortaj kaj havas materian bazon en la socialismaj landoj. La registaroj de la socialismaj ŝtatoj defendas homarajn interesojn en konsento kun la interesoj de ĉiuj popoloj. En la socialisma socio akordiĝas patriotismo kaj

internaciismo, enkadre de imperiismo socio pro la klasaj kontraŭdiroj tio estas iluzio. La 14-an de aprilo 1917, en la tria jaro de la unua mondmilito, Zamenhof mortis. La pacaj fortoj ne kapablis eviti militon. Tio estis granda bato por li, tamen lia optimismo pri la evoluo de la homaro ne pereis. Dum la milito li verkis alvokon al la diplomatoj titolita „Post la granda milito", en kiu li alvokas krei veran pacon en Eŭropo", per kreo de „politika justeco absoluta, t. e. natura, ĉie por ĉiuj egala, kiam en ĉiu lando ĉiuj loĝantoj estos morale kaj materiale plene egalrajtaj"[19]). Liaj rimedoj — la internacia lingvo kaj la homaranismo — ne estis taŭgaj eviti pluan militon, sed liaj verkoj kaj pensado efikas ĝis hodiaŭ.

La internacia lingvo Esperanto pruvis sian taŭgecon faciligi la interkompreniĝon de popoloj, liaj humanismaj celoj, lia respondecplena agado por la paco estas por ni devo al respondecplena agado en nia tempo konsiderante la spertojn de la historio.

Se en la alvoko al la 35a datreveno de la fondiĝo de nia respubliko tekstis: „La socialismo en GDR estas la heredanto kaj daŭriganto de ĉio bona, progresiva, humana kaj demokratia en la historio, ĉar ĝi enkorpigas progreson, demokration kaj humanecon", ĝi ankaŭ inkluzivas la heredaĵon de la burĝa humanisto Zamenhof. Kritike ni alproprigas al ni tiun heredaĵon, ĉar ni scias, ke sociajn kontraŭdirojn oni ne forigas per idealoj, per revoj pri bela estonto, sed per realaj sociaj fortoj. Nia historia optimismo kreskas el nia scienca scio pri la leĝoj de homa historio.

Literaturo kaj fontoj

1) Privat, E., Vivo de Zamenhof. Rickmansworth 1957, (4a eldono)
2) Waringhien, G., 1887 kaj la sekvo. Eseoj IV., Antverpeno — La Laguna 1980
3) Boulton, M., Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto. La Laguna 1962
4) Drezen, E., Zamenhof. En: Blanke, D. (Red.), Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, Budapest 1978
5) Ziolkowska, M., Doktor Esperanto. Warszawa 1959
6) Ludovikito (= Ito Kanzi), Senlegenda biografio de L. L. Zamenhof. Tokio 1982
7) Maimon, N. Z., La kaŝita vivo de Zamenhof. Tokio 1978
8) Holzhaus, A., Doktoro kaj lingvo Esperanto, Helsinki 1969
9) — Murgin, C., L. L. Zamenhof dum la revoluci-prepara periodo (1910 — 1914). En: GDR-eldono de „Paco", Berlin 1981, p. 34 — 35
— Murgin, C., L. L. Zamenhof pri la interna ideo de la esperantismo. En: GDR-eldono de „Paco", Berlin 1982, p. 34 — 38
— Murgin, C., L. L. Zamenhof pri la internacilingva ideo. En: GDR-eldono de „Paco", Berlin 1983, p. 33 — 34
10) LZ, p. 106
10a) Arnold, St./Zychowski, M., Abriß der Geschichte Polens, Warszawa 1967
11) Schlösser, A.: Shakespeare-Analysen und Interpretationen. Berlin-Weimar 1977
12) OV, p. 369
13) OV, p. 351
14) OV, p. 348
15) OV, p. 349
16) OV, p. 417 — 422
17) OV, p. 331
18) OV, p. 341
19) OV, p. 356

OV = L. L. Zamenhof: Originala Verkaro. Eld. J. Dietterle, Leipzig 1929

LZ = Leteroj de L. L. Zamenhof. Eld. de G. Waringhien, parto I 1901 — 1906. Paris 1948

Ekspozicio pri la Venko

Klubo de internacia amikeco kaj la urba konsilantaro de la urbo ALUKSNE en la aprilo de 1985-a jaro aranĝos specialan ekspozicion dediĉe al la 40-a datreveno de la Venko super la faŝisma germanio. La komsomola komitato decidis fondi specialan premion al tiuj kluboj kaj redakcioj, kiuj plej mal avare helpos en la organizado de la ekspozicio. Ni petas sendi bildkartojn, suvenirojn, flagetojn kaj insignojn de viaj urboj kaj aliajn materialojn. Ĉiujn materialojn bonvolu sendi al Kovnators Naumo, 228730, Latva SSR, ALUKSNE, Omskas 16-2, Sovetunio.

Pri la IVa Centra Renkontiĝo de GDREA

La Kvara en Dresdeno: multflanka kaj multloka

1. Konferencoj kaj renkontiĝoj

Demandis eksterlanda gasto pri la diferenco inter kongreso, konferenco kaj renkontiĝo de GDREA. Nu — kongresojn ni tute ne okazigas, ĉar la nomo estus tro pompa por niaj aranĝoj.
Konferencojn ni havas tiam, se kunvenas demokratie elektitaj delegitoj (de sube supren) kaj elektas siajn distriktajn aŭ centran estrarojn. Tio okazas ĉiun kvinan jaron. La elektrokonferencojn ni kalkulas ekde 1972. 1981, kiam oni fondis la Esperanto-Asocion el la malnova Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, fakte okazis la IIIa Centra Konferenco de Esperantistoj en Kulturligo de GDR. La IVa Centra Konferenco (jam de GDREA) okazos 1987, dum la jubilea jaro de Esperanto. En Dresdeno okazis la IVa Centra Renkonto (aŭ renkontiĝo) de GDREA de 28. — 30. septembro 1984. Ne estis elektoj. En aliaj landoj oni nomas niajn centrajn konferencojn kaj renkontiĝojn aŭ sendistinge „kongresoj" aŭ foje „landa konferenco", „delegita konferenco" kaj simile.

2. Timoj kaj celoj de la Kvara

Sincere dirite, la organizintoj de la Kvara Renkontiĝo iom timis pro la eksterordinare malfacilaj teknikaj kondiĉoj. Ne eblis trovi en Dresdeno komunan tegmenton por ĉiuj aranĝoj kaj bonvenajn loĝeblecojn. Ĉion ĉi ni ja havis 1981 en Karl-Marx-Stadt. Ĉi-foje ĉiu aranĝo dum duontago aŭ vespero okazis en alia konstruaĵo. Oni devis multe trami kaj busi, tiel konatiĝante kun la bela Dresdeno. La loĝado eblis en la — sufiĉe malaltkvalita — internacia (kial internacia??) aŭtokampadejo Mockritz ĉe la periferio de Dresden. Feliĉe la vetero estis pli bona ol antaŭdirite, tial verŝajne ne estis tro da malvarmumiĝintoj.
La dresdena loka preparkomitato sub la gvido de **doc. d-ro sc. techn. Günter Minkwitz,** plej forte helpata i. a. de **Evelin kaj Jürgen Berndt** kaj kun bonega subteno flanke de la Distrikta Estraro de Kulturligo faris grandegan laboron. Tre helpis i. a. **s-ino Laabs,** kiu loĝas . . . en la Zamenhofstrato en Dresdeno. Bone, ĉu ne? Aparte ili meritas plej grandan dankon, sed ankaŭ multaj aliaj esperantistoj el Dresden, membroj de la Centra Estraro kaj la sekretariinoj de la oficejo de GDREA. Evidente eblas konstati postrenkontiĝe, ĉio ĉi fariĝis konsiderinda sukceso. Kaj la celo de la aranĝo? La IVa Centra Renkontiĝo de GDREA celis iom bilanci la faritan laboron ekde la fondiĝo de GDREA kaj konkludi pri farendajoj, aparte konsiderante la novan internacian situacion, kiu estas karakterizita per tre danĝera streĉiteco, kaŭzita de la senprecedenca altarmada kurso de la Reagan-administracio.
La Renkontiĝo, okazinta kelkajn tagojn antaŭ la jubileo de GDR, la 35a datreveno de ĝia fondiĝo, kompreneble ankaŭ celis omaĝi al tiu grava evento. Kaj fine, ĉio ne estas disigebla de la antaŭa, oni volis doni kulturan kaj fakan oferton al la partoprenantoj. Ĉio ĉi bone sukcesis.

3. Partoprenintoj

Partoprenis ĉirkaŭ 190 membroj de GDREA kaj 60 eksterlandaj aliĝintoj, do sekve ĉ. 250 homoj. Valoras substreki, ke krom la membroj de la Centra Estraro ĉiuj partoprenintoj mem pagis sian partoprenon. Krome kiel oficialaj gastoj oni povis saluti el Bulgario **Violin Oljanov,** ĉefredaktoro de „Paco", membro de la prezidio de Bulgara Esperanto-Asocio. El ČSSR la Slovakan Esperanto-Asocion reprenzentis ties vicprezidantoj **Milan Zvar** kaj **d-ro Elemir Erby,** de la Ĉeha Esperanto-Asocio ĉeestis ties prezidanto **d-ro Jaromir Jermař.** El Pollando venis la membro de la Ĉefa Estraro, mag. inĝ. **Andrzej J. Kraszewski** kaj oni ankaŭ povis saluti malnovan amikon de GDREA, **mgr. Lech Koženiak.** Hungaran Esperanto-Asocion reprezentis ties sekretario **Imre Szabo.** Ĝenerale oni povis konstati, ke relative multis junularo kaj homoj ankoraŭ neniam partoprenintaj grandan centran esperantistan aranĝon en GDR. Aparte impresa estis la fakto, ke sole el Slovaka Socialisma Respubliko venis buso kun 35 geesperantistoj. Ili bonege enkadriĝis en la programon kaj forte helpis internaciigi ĝin. Se temas pri partopreno de la aranĝoj oni tamen kelkfoje havis la impreson, ke ne ĉiuj aliĝintoj ĉiam trovis la kunvenejojn.. Eble (tro?) multaj fojfoje preferis promeni kun amikoj? Fakto ja estas, ke ĝuste por senĝenaj kaj senformalaj amikaj renkontiĝoj la programo ne lasis tro da truoj. Sed — se oni jam ofertas ampleksan programon tute neenuigan, tiam oni uzu la eblecon partopreni!

4. Antaŭprogramoj

Jam **merkrede, la 26an de septembro** en la konferencejo de la Distrikta Estraro de Kulturligo okazis sukcesa gazetara konferenco. Sekvo estis parte eĉ longaj raportoj en la gazetaro de la distrikto Dresden. La lumskriba informa bendo super la ĉefa stacidomo informis pri la Renkontiĝo, same la regiona radio-stacio. Sur la oficialaj afiŝoj de Kulturligo sur ĉiuj afiŝkolonoj en Dresden estis klare indikita la Centra Renkontiĝo. Sur la ĉefa stacidomo granda dulingva informtabulo atentigis nepretervideble pri la aranĝo, same similaj tabulegoj antaŭ la unuopaj kunvenejoj.
Jaŭdo, la 27an de septembro, vespere en la kunvenejo de la dresdenaj esperantistoj okazis unua internacia renkontiĝo. La jam ĉeestantaj gastoj el ČSSR, Hungario kaj Pollando abunde informis pri sia esperantista agado. Aparte interesaj estis la klarigoj

de **Imre Szabo** de HEA, respondeculo pri la senprecedenca hungara libroeldonado en Esperanto, pri la bilanco kaj planoj rilate eldonojn en Esperanto. Kun ĝojo oni aŭdis, ke HEA konsideras eldoni „Faŭst" de Goethe en la traduko de la forpasinta **d-ro Karl Schulze.** Ne tute kompreneble al la germanaj ĉeestintoj estis la (ŝajna?) kondiĉo, ke GDREA devus garantii antaŭmendon de granda kvanto de la eldonota libro. Certe la membroj de GDREA volonte akiros la libron. Sed Faŭst certe ne estas simple germana literaturaĵo sed ja pintaĵo de la monda literaturo, kio devus trovi saman aŭ eĉ pli grandan intereson kiel en germanaj ankaŭ en negermanaj landoj. Krom tio, sed ne nur lige al Faŭst, oni tre esperas, ke la akiro de libroj el Hungario pere de la Hungara Kulturcentro en Berlin konsiderinde plirapidiĝu. Nepre necesas serioze ŝanĝi la situacion.

Vendrede, la 28an de septembro, al jam alveturintoj oni ofertis ekskursojn tra la urbo kaj al la fama pentraĵgalerio. Fine ankaŭ okazis la tradicia interkonatiĝa vespero. Eble ĝi ne estis tradicia. Ĉi-foje ne mankis kultura programo. Eble la malmulta tempo (18 — 21,30 h). enhavis tro da programeroj tiel, ke ne restis sufiĉe da tempo por interkonatiĝi, reinterkonatiĝi kaj danci. Tamen, la nivelo de la kontribuoj estis bonega. Oni sekvis (iom tre longan kaj tro malfacilan) kvizon, gviditan de **Michael Behr,** kiun gajnis **Bert Schumann.** Kantis per bela voĉo kaj tute sen bulgaraj prononcdifektoj la bulgara kantisto **Michail Tŝergov** de la Operejo el Schwerin. Nova talento montriĝis la „verda magiisto" **Helmut Rieche.** Aparta surprizo por ĉiuj, kaj eĉ kulmino de la tuta vespero, fariĝis la gitara ludo, kantado kaj poemdeklamado de la tri fabele ĉarmaj junaj slovakinoj **Marta Onuŝková, Lubica Preidschoftova** kaj **Marta Benešová.** Ili prezentis belprononce popolkantojn kaj modkantojn, recitis slovakajn poemojn — ĉion ĉi fundigita sur ekrano per belegaj koloraj diapozitivoj de **Milan Zvara.** La interesaj voĉoj de la knabinoj esperigas pri baldaŭa kanzonkasedo. certe forte aplaŭdota kaj aĉetota.

Ankoraŭ restas mencii, ke ĉiuj aliĝintoj ricevis ekstere tre modestan dokumentujon kun tamen interesa enhavo. Enestis en la dokumentujo i. a. plakedo de la renkonto, preciza programo, gravaj sovetiaj materialoj de Ĉernenko kaj pri malarmado eldonitaj de APN (Novosti), poŝtkarto kun porokaza stampo, kolekto de belegaj koloraj vidajkartoj pri Dresden kaj ĉirkaŭo, la lasta eldono de Dresdena Esperanto-Informilo kaj materialoj pri la pentraĵgalerio kaj pri la ĵazkelo „Barelego", kie okazis ĵazkoncerto por la esperantistoj.

Cetere, ankaŭ en Leipzig aperis filatelaĵo okaze de la Renkonto. Ekzistis literaturstando por aĉetemuloj.

5. Sabata malfermo

La oficiala malfermo de la Renkontiĝo okazis **sabate, la 29an** de septembro en salonego de la Teknika Universitato. Malfermis la Renkontiĝon **d-ro Detlev Blanke,** sekretario de GDREA. Salutparoladis la prezidanto de la Distrikta Estraro en Dresden, **doc. d-ro sc. Günter Minkwitz,** la membro de la prezidio de Kulturligo, ligo-sekretario **d-ro Manfred Fiedler,** la dua sekretarnio de la Distrikta Estraro de KL en Dresden, **s-ro Kaltofen** kaj la membro de la prezidio de Packonsilantaro de GDR kaj de la ĉefestraro de la Kristana Demokratia Unuiĝo, **studkonsilisto Fritz Rick.** Li prezetis oficialan salutmesaĝon de la plej altaj reprezentantoj de la Packonsilantaro de GDR, **prof. d-ro Günther Drefahl,** prezidanto, kaj **Werner Rümpel,** ĝenerala sekretario. La mesaĝon ni publikigas ĉikajere dulingve.

Sekvis la ĉefa referaĵo de la Centra Estraro de GDREA, kiun prezentis ties prezidanto **Hans Heinel,** diplomita filozofo. La tekston de la referaĵo ni sube publikigas. Ĉi-foje la diskuto estis strukture nekutima kaj senformala. Partoprenintoj demandis kaj membroj de la Centra Estraro, laŭ kompetenteco pri la starigitaj demandoj, respondis. I. a. oni aŭdis demandojn kaj respondojn pri la monda festivalo 1985 en Moskvo (kaj eventuala esperantista partopreno), pioniraj Esperanto-rondoj en GDR, la agado de la fakgrupoj (medicinistoj, fervojistoj, pedagogia komisiono), eldonaĵoj en Esperanto, hungaraj libroj en Esperanto, la signifo de la amikeckontrakto kun la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (oni tre bedaŭris la mankon de oficiala sovetia reprezentanto), kultura agado, estontaj mondaj kongresoj k. a.

Fine de la antaŭtagmeza oficiala parto la partoprenantoj metis florkronon honore al la murdita antifaŝisto, **Georg Schumann,** kies memorŝtono troviĝas en la korto de la universitato kaj iama juĝejo. Pri la vivo kaj batalo de Georg Schumann koncize informis **d-ro Günter Minkwitz.**

6. Faka posttagmezo

La posttagmezo de la sabato estis dediĉita al fakaj prelegoj kaj laboro de diversaj komisionoj. En kulturdomo „August Bebel" ĉiuj salonoj estis je la dispono de la Renkonto. Oni aŭskultis tri ĉefajn fakajn prelegojn: **Imre Szabo** (Hungario): „Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko"; **d-ro Erich-Dieter Krause:** „Evoluo de la leksiko de Esperanto"; **d-ro Detlev Blanke:** „100jara Esperanto: bilanco kaj perspektivo". Kunsidojn de la kvar grandaj fakkomisionoj gvidis **d-ro Till Dahlenburg** (kursgvidantoj), **Wera Dehler** (apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko), **d-ro Detlev Blanke** (interlingvistiko) kaj **Michael Lennartz** (publika informado pri Esperanto). Krome kunvenis la MEM-komisiono. Komputistoj, fervojistoj, medicinistoj. En la vestibloj de la kulturdomo oni povis admiri 20 akvarelojn de **Rudolf Hahlbohm,** vicprezidanto de GDREA, kiujn li pentris okaze de liaj vizitoj en amikaj socialismaj landoj. **Rudolf Hahlbohm,** i. a. profesia grafikisto, ankaŭ pentris la unuan Zamenhofbildon de GDR (en oleo). Ne mankis librostando.

7. Kulturo por distro kaj omaĝo

Aparta trajto de la IVa Renkontiĝo estis la altkvalitaj kulturaj programoj. Se en la pasinteco ni ĝenerale importis artistojn, oni nun ĝoje kaj fiere — kaj surprize — povis konstati kaj admiri proprajn fortojn. **Manfred Arnold** bonege preparis, kunordigis kaj mem tre aktive partoprenis la kulturajn aranĝojn. Sabate vespere oni povis ĝui preskaŭ duhoran programon. Kaptis per sia klara voĉo

Por pli alta socia efiko de GDREA

El la ĉefreferajo de la Centra Estraro de GDREA dum la IV-a Centra Renkontiĝo en Dresden, prezentita de la prezidanto Hans Heinel)

I

La tasko de nia Renkontiĝo estas
— fari malgrandan bilancon pri nia agado post la fondo de GDREA en la jaro 1981 en Karl-Marx-Stadt, kaj
— elstarigi kelkajn gravajn porblemojn de nia agado dum la sekvaj jaroj de nia jardeko.

Ne plu estas multe da tempo ĝis kelkaj gravaj jubileoj kaj eventoj:
— dum sekva jaro la progresemaj homoj festos la venkon super la faŝisma Germanio, la liberigon de la germana popolo fare de la Ruĝa Armeo,
— kaj en la jaro 1987 ni ne nur omaĝos al la centjara internacia lingvo de d-ro Zamenhof, sed ankaŭ okazigos la 11an Kongreson de Kulturligo kaj la IVan Centran Konferencon de GDREA kun novelekto de la Centra Estraro de nia Asocio.

Jen ankoraŭ multo farenda, aparte ĝis la jubileo de Esperanto.

La agado de la esperantistoj ĉiam estis en alta grado politika laboro kaj forte influita de la internacia politika situacio, kvankam pri tio la unuopulo eble ne ĉiam konscias. Tiu fakto donas al nia Asocio altan politikan respondecon kaj postulas ĉiam denove la konsideron de la aktuala internacia politika situacio. Bedaŭrinde ni devas konstati, ke la jubilea jaro de GDR okazas en internacie tre komplika tempo, periodo tre signifoplena por la estonteco de la homaro. Ekde la dua mondmilito neniam antaŭe la paco estis tiom endanĝerigita kiel nuntempe.

Paca kunekzistado aŭ nuklea katastrofo. Jen la elekto.

Se 1981 la progresemaj porpacaj fortoj ankoraŭ batalis por malebligi la lokigon de nukleaj raketoj sur okcidenteŭropa teritorio, tiu lokigo hodiaŭ estas kruda fakto kaj ampleksas pli ol 7 000 nukleajn eksplodilojn. Necesis la konsekvenca reago de Soveta Unio por gardi la ekvilibron. Ni nun havas internacie tute novan situacion, kiu ankaŭ de ni esperantistoj postulas seriozajn konkludojn por nia estonta agado.

Malgraŭ tiu tre danĝera situacio nia lando dum sia jubilea jaro povas fari pozitivan bilancon en ĉiuj sferoj de la

---

Margot Berthold el Leipzig, pianakompanis **Michael Behr.** Ankaŭ kun denova sukceso oni povis aŭskulti kantojn en la prezento de **Michail Tŝergov,** akompanita de sia edzino. Ne mankis la „verda magiisto" **Helmut Rieche,** kiu surprizis per siaj trukoj. Tre bele premieris BELIKO, t. e. berlinaj deklamantoj (iuj diras, ke ankaŭ povas temi pri „scienco pri belo", laŭ la modelo ‚lingviko').

Bonege deklamis **Wera Dehler, Manfred Arnold** kaj **Fritz Wollenberg.** Ke **Manfred Arnold** estas tre multflanka talento, tute klare evidentiĝis unuan fojon por la esperantistoj en Dresden. Konata li jam estas kiel poemverkanto kaj tradukisto. Dum la kultura vespero oni aŭdis liajn solprezentojn sur akordiono („sabrodanco" de Ĥaĉaturjan), sur ksilofono („palisandro" de Ady Kurth, piana akompano de **Michael Behr.** Tiu kaj **Manfred Arnold** kvarmane pianludis komponaĵon de **Arnold** (la companera). Entute bonega vespero. Paralele al ĉi-tiu okazis en la jazkelo „Barelego" jazkoncerto de la tipo ‚dixiland', kiu ankaŭ plene entuziasmigis la multnombrajn vizitintojn.

La Kvara finiĝis **dimanĉe, la 30an de septembro,** per solena programo okaze de la 35a datreveno de la fondo de GDR. Pianludis muzikdirektoro **Wilhelm Meister,** kantis **Margot Berthold** kaj deklamis **Manfred Arnold** (i. a. „la ŝtato" de Becher), **Wera Dehler** („Demandoj de la leganta laboristo" de Brecht) kaj **Fritz Wollenberg** („Jubilea parolado" de **Manfred Arnold).** Sekvis prelegoj de **Manfred Arnold** pri la pacideo en la literaturo kaj de **Fritz Wollenberg** pri la humanisma mesaĝo de L. L. Zamenhof, honore al lia ĉijara 125a naskiĝtago. Kompreneble oni utiligis la solenan kaŭzon por distingi 10 membrojn de GDREA per la Honora insigno kaj per florbukede danki al la plej aktive laborintoj de la Renkontiĝo. Oficiale finiĝis la Kvara Renkontiĝo. Iuj ankoraŭ vizitis la pentrajgalerion en Dresden, aliaj la Karl-May-muzeon en Radebeul. La IVa Renkontiĝo estis vere multflanka, multloka, digna jubilea omaĝo kaj certe stimuliga por la plua agado de GDRE.

Necesas nun ekprepari la Centran Konferencon okazontan en la jaro 1987, la jubilea jaro de Esperanto. Kiu distrikto transprenos la taskon?

Peter Levsen

socia vivo: politika, ekonomia, socia-la, kultura kaj aliaj.
Malgraŭ la neceso venki ĉiam denove multajn malfacilaĵojn, malgraŭ la neceso ankaŭ ekonomie garantii la defendan sekurecon de nia lando, malgraŭ tio GDR stabile kaj prospere evoluas. Kaj kompreneble, Germana Demokratia Respubliko plenumas kaj ankaŭ estonte plenumos sian devontigon, ĉion fari, por ke ekestu neniam denove milito de sur germana tero.
La firma pacpolitiko de nia lando, intime ligita al Soveta Unio kaj la aliaj frataj socialismaj landoj, en la mondo estas vaste rekonata kaj aprezata. Ke estas tiel, estas ankaŭ iomete rezulto de la sindediĉa laboro de multaj membroj de nia Esperanto-Asocio.

II

Rigardante la evoluon de Esperanto en tutmonda skalo, oni povas noti kelkajn gravajn sukcesojn spite al la malboniĝinta internacia politika klimato:

1. Eblis daŭrigi la progreseman laboron de Universala Esperanto-Asocio.
2. La 68a Universala Kongreso de Esperanto dum la lasta jaro en Budapeŝto estis la plej granda post la dua mondmilito, kaj eble eĉ en la historio de Esperanto. Ĝin partoprenis ankaŭ 150 esperantistoj el GDR.
3. En gravaj internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj Esperanto trovas pli kaj pli da atento, kio pruvas i. a. la partopreno de la ĉefa kunordiganto de la Monda Komunika Jaro de Unuiĝintaj Nacioj, la ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio lastjare en Budapeŝto en la Universala Kongreso.
4. Mondpaca Esperantista Movado, MEM, pli kaj pli sukcese aktivadas kaj intime kunlaboras kun Monda Packonsilantaro. En ties revuo „Novaj Perspektivoj" ĉijare aperis ampleksa artikolo de la prezidanto de MEM, kies salutmesaĝon ni hodiaŭ aŭskultis kun ĝojo. La prezidanto de Monda Packonsilantaro, Romesh Chandra, akceptis lastjare delegitaron de UEA kaj promesis kunagadi kadre de la centjariĝa jubileo de Esperanto.
5. Konsiderindajn novajn aktivecojn de esperantistoj ni notas ankaŭ en neeŭropaj landoj. Dum la lastjara Kongreso en Budapest Kuba Esperanto-Asocio fariĝis kolektiva membro de UEA.
   Impetajn progresojn faras Ĉina Esperanto-Ligo, kiu invitis la 71an Kongreson por 1986 al Pekino. Eĉ en Nikaragvo, al kies klopodoj defendi sian suverenecon ni estas kore ligitaj, jam ekzistas malgranda asocio.
6. Dum la lastaj jaroj tutmonde konsiderinde kreskis kvalite kaj kvante la libroproduktado en Esperanto.
7. Tre rimarkeble plimultiĝas publicaĵoj kaj aliaj aktivecoj sur la kampo de scienc-teknika apliko de Esperanto kaj en la sferoj de la sciencaj disciplinoj interlingvistiko kaj esperantologio.
8. Kaj nepre ni ne forgesu la fakton, ke ĉi-jare Radio Polonia disaŭdigis jam la 25an jaron en Esperanto.

Estas tute klare, Esperanto ne plu estas neglektinda hobio sed serioza kulturpolitika instrumento, kiun oni respondece devas trakti kaj utiligi. Tamen, sub kondiĉoj de paca kunekzistado la rezultoj povus esti multoble pli grandaj.
Aliflanke, kompreneble, ni ne povas fermi la okulojn antaŭ kelkaj negativaj fenomenoj en la nuntempa Esperanto-movado. Aparte en la reakciaj rondoj de la tielnomata „Neŭtrala Esperanto-movado", sub gvido de Ivo Lapenna, sed ne nur tie, aperas antikomunistaj kaj antisovetiaj materialoj, kiuj tute ne helpas al la evoluo de Esperanto. Kaj kun mirego nia asocio notas, ke la junulara sekcio de Universala Esperanto-Asocio, TEJO, al kiu ankaŭ nia Asocio kolektive membras, planas okazigi sian kongreson por 1986 en Israelo, lando kiu faras multon por militigi la proksimorientan regionon.
Ĉu politika naiveco aŭ konscia klopodo subfosi la kolegecan kunlaboron en UEA kaj TEJO? Ĉiukaze ni devas atenteme sekvi la evoluon!

III

Kiel ni pritaksu la laboron de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR? Ne povante ĉi-tie doni ampleksan laborraporton, mi tamen volas elstarigi kelkajn faktojn:

1. Per celkonscia internacia korespondado, per respondecplena partopreno en Universalaj, Junularaj kaj fakaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj, kaj entute per la multflanka agado de siaj membroj, nia Asocio donis kontribuon al plua plialtigo de la reputacio de GDR en eksterlando. Tre grava materialo ĉi-rilate estis la prospektoj pri la iamaj koncentrejoj Buchenwald kaj Sachsenhausen kaj la luksaj eldonoj de Paco de la MEM-sekcio de GDR.
2. Al tiu agado ankaŭ servis jam tradiciaj internaciaj aranĝoj kiel la Foira Renkontiĝo IFER, la ĉe-Berlina kleriga-turisma feriado IREBIK, la germanaj-ĉeĥaj turismaj tagoj en Ercmontaro ITRE kaj ne laste la tendaroj SEFT en la norda lagoregiono.
3. Plue pozitive evoluis la kunlaboro kun la Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj. Gravajn impulsojn donis la Konsultiĝoj dum lastaj jaroj en Jerevan, Varsovio kaj ĉijare en nia lando, en Bad Saarow. Post la 17a Konsultiĝo ĉijare nia Asocio povis subskribi amikeckontrakton kun la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, kiu certe grave stimulos nian kunlaboron. Ankaŭ la partopreno de esperantistoj el kelkaj frataj landoj en nia IVa Centra Renkontiĝo estas pruvo pri niaj daŭre pliintensiviĝantaj ligoj.
4. Tre grava kaj altnivela laboro ankaŭ estas bona faka agado. Aparte laŭdindaj ĉi-rilate estas i. a. la internaciaj fakaj seminarioj de UEA 1981 pri planado kaj 1982 pri scienc-teknika apliko, ambaŭ en Bad Saarow. Ankaŭ la impulsoj, kiuj venas de nia Asocio pri interlingvistiko, pedagogio, leksikografio kaj terminologiscienco, aparte ligitaj al la nomoj Detlev Blanke, Till Dahlenburg, Erich-Dieter Krause kaj Wera Dehler, ĝuas internacian estimon.
   Gravaj fakverkoj estas en preparo. Sekvan jaron Akademie-Verlag eldonos la ampleksan libron „Internationale Plansprachen" de d-ro Blanke. D-ro Krause jam komencis la laboron super la granda vortaro Esperanto-Germana, kaj antaŭnelonge doktoroj Dahlenburg kaj Blanke subskribis kontrakton por pretigo de konversacia libro Germana-Esperanto.
5. Ni ankaŭ notas stabilan progresan evoluon en la gazetara laboro. 1982 kaj 1983 aperis po ĉirkaŭ 300 artikoloj. La tendenco daŭras.
6. Kun ĝojo ni konstatas tre esperigajn komencojn en la laboro kun junaj pioniroj sub gvido de Fritz Wollenberg. Jam la kvaran fojon ĉe Berlin okazis tendaro.

Jen — nur kelkaj ekzemploj.

IV

Malgraŭ la konsiderindaj sukcesoj en nia agado, ni devas malkaŝe diri, ke nia Asocio postrestas en kelkaj sferoj de aktivecoj, kompare al aliaj asocioj en socialismaj landoj kaj en aliaj regionoj kaj rigarde al la necesoj. Laŭ tiu aspekto ni tute ne povas esti kontentaj. Mi volas mencii kelkajn problemojn:

1. La menciita internacia politika situacio postulas de ni, agi multe pli konkrete kaj videble por la paco. Ni devas senmaskigi la danĝeregan politikon de la usona registaro sub Ronald Reagon kaj ĉiuflanke subteni kaj propagandi la multajn pacproponojn de Soveta Unio kaj la progresemajn proponojn de aliaj registaroj. Tiu agado devas esti konkreta: per ekspozicioj, prelegoj, korespondoj kaj aliaj rimedoj. Pli forte ol antaŭe rolon devas ludi nen ĉio postulas plialtigon de la politika-ideologia scio de ĉiuj membroj.
2. Malgraŭ bedaŭrinde ne ignoreblaj limoj en preseblecoj ni devas nepre trovi vojojn por pli forte kaj efike informi la eksterlandon pri la evoluo kaj pacpolitiko de nia lando.
   Tio estas unu el niaj ĉefaj taskoj.

3. Granda eraro en la laboro de multaj grupoj estas ofte konstatebla manko de internacieco. Ĉiu grupo devas nepre havi konkretajn internaciajn rilatojn kaj doni al la grupkunvenoj internaciisman enhavon. Tio ankaŭ validas por distriktaj renkontiĝoj, kiuj ofte ĝuste pro manko de internacieco ne ĉiam estas sufiĉe allogaj. Nepre ni devas multobligi la rilatojn al la Esperanto-asocioj de la socialismaj landoj kaj al progresemaj esperantistoj el aliaj landoj.
4. Ofte ne uzita tereno, efike agadi, estas nia propra organizajo: Kulturligo. Tro malofte ni vidas ekzemplojn de konkreta kunlaboro kun filatelistoj, fotistoj, literaturamantoj, naturamikoj ktp.
5. Kaj nepre ni devas rekonsideri la lingvo-instruadon en niaj grupoj kaj kursoj. Ni konservu bonaj pruviĝintajn metodojn sed samtempe serĉu novajn, pli efikajn. Certe ni devas aparte apliki intensivajn formojn de la instruado kaj ellabori pluajn taŭgajn metodikajn helpilojn. Tre urĝas fini la ellaboron de la ekzamena sistemo.
6. Ni ankaŭ ne ignoru la fakton, ke la lingvaj kapabloj, kaj primovadoj scioj de la membroj de nia Asocio tro ofte ne respondas al la internaciaj postuloj. Ni nepre devas plialtigi la kvaliton ankaŭ ĉi-rilate. Apartan atenton ni devas dediĉi al la trafa elekto, bona preparado kaj daŭra kvalifikado de la funkciuloj kaj aktivuloj de nia Asocio.
7. Kvankam dum lasta jaro iom plialtiĝis la membronombro, ĝis sume pli ol 1700, tamen ni devas konsiderinde plilarĝigi kaj plifortigi la bazon, do informi pli efike pri Esperanto, trovi pli da interesitoj, gvidi pli da bonaj kursoj kaj krei novajn kaj stabilajn grupojn.
8. Ĉio ĉi kaj multo ne menciita, sed farenda, ebligos al nia Asocio pli efike plenumi la bazajn taskojn de Kulturligo, la gvidliniojn de nia Asocio kaj per tio kontribui samtempe al la progreso de la tutmonda Esperanto-movado.

Se en la jaro 1987 oni internacie rekonos la fakton, ke Esperanto fariĝis centjara grava kulturpolitika faktoro, tiam al tiu rekono apartenu ankaŭ nia kontribuo!
Sed ne nur tio! Ni agadu por tio, ke mondo havu pacon!

Letero de leganto

D-ro Rudolf Fischer el Norwalde/FRG, skribas pri la raporto pri la VI-a Renkontiĝo de pacdefendantoj en Pardubice (kp. de 2/1984, p. 37):
„La raporton, ke la rezolucio en Pardubice trovis nur 1 kontraŭvoĉon, mi ŝatus korekti, ke fakte estis 3 kontraŭvoĉoj kaj pluraj sindetenoj. Mi kontraŭvoĉdonis pro la parto, ke la „partoprenintoj ... opinias natura, ke la socialismaj ŝtatoj estas devigataj ... fari tiajn aranĝojn, por konservi ekvilibron kaj tiel obstakli uzon de la raketoj de la unua frapo ..." Kvankam oni evitas la vorton „raketo", tio ja povas nur signifi, ke la pacdefendantoj estas „nature" ne kontraŭ novaj raketoj en la socialistaj ŝtatoj. Mia propra opinio troviĝas en la parto, ke „la popolo de unuopaj landoj komprenu, ke kia ajn homa scipovo, minimuma kvanto de materialo kaj energio de kia ajn speco, uzita por produktado de kiaj ajn armiloj, ... estas krimo kontraŭ la homaro ...". Se la rezolucio estus enhavinta nur tiun lastan frazon (kaj konformajn), mi ankaŭ volonte estus porvoĉdoninta."

Triafoje alta ordeno por Aleksiev

Lige al lia 75-a naskiĝtago Nikola Aleksiev, heroo de socialisma laboro kaj merita kulturaganto, estis distingita la trian fojon per la ordeno „Georgo Dimitrov". La Generala Sekretario de la CK de Bulgara Komunista Partio kaj Prezidanto de la Ŝtata Soveto, Todor Jivkov, sendis salutleteron.

Dankon pro jubileaj gratuloj

Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) ricevis tre simpatiajn gratulojn okaze de la 35-a datreveno de la fondiĝo de GDR. Al ĉiuj asocioj, kluboj kaj unuopuloj ni tre sincere dankas, esperante pri pluaj amikaj rilatoj kaj pacon prospere al niaj komunaj strebadoj.

Ce de GDREA

Deklaro

La partoprenantoj de la IVa Centra Renkontiĝo de GDREA konstatas, ke la internacia situacio flanke de la imperiismaj fortoj, katastrofe malboniĝis, precipe kaŭze de la milit-industriaj kompleksoj kaj pro la politiko de la nuntempa Usona „Regan"-administracio.

La ekzisto de la homaro estas grave minacata. La ĉi-tie kunvenantaj membroj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR subtenas la pacan politikon de la socialisma ŝtataro. Okaze de la 35a datreveno de la fondo de GDR ni sentas precipe, ke nia socialisma ŝtato estas firma bazo por nia komuna strebado al paco kaj certigo de la humanismaj principoj en la kunvivo de la popoloj. En la nuntempa tutmonda situacio, kiam ĉiuj pacemaj homoj forte devas lukti por certigi la pacon por niaj infanoj kaj genepoj, aparte gravas internaciaj rilatoj por paca batalo. Pro tio ĉiuj membroj de Esperanto-Asocio de GDR forte subtenas porpacajn aktivecojn kaj la proponitan interkonsenton kadre de MEM.

Ni deklaras, ke ni per aktiva porpaca agado kaj helpe de niaj internaciaj rilatoj ĉion faros por klarigi la pacan politikon de la socialismaj landoj kaj por malkaŝi la verajn kaŭzojn de la imperiismaj militpreparoj por videbligi la katastrofajn tuthomarajn sekvojn de la nuntempa vetarmigado. En la senco de tiuĉi deklaro la partoprenantoj, post reveno de la renkonto, inencas plifortigi siajn aktivecojn sur distrikta kaj subdistrikta niveloj en GDREA, luktante por realigi la celojn de la Mondpaca Esperanto Movado kaj por kontribui al venko de la tutmondaj pacfortoj.

MODELO DE SCIENCISTA PORESPERANTA AGADO

Univ. Profesoro d-ro Ignat Florian Bociort — 60-jara

Okaze de la 60-jariĝo de univ. prof. d-ro I. F. Bociort (la 13-an de oktobro 1984) oni povas paroli pri li kiel pri elstara sciencisto, kiu ne simple verkis ĉirkaŭ 200 studojn kaj artikolojn pri estetiko, literaturteorio, rumana kaj monda literaturoj, stilistiko aŭ interlingvistiko, sed respondis gravajn kulturteoriajn ofte debatitajn problemojn; el plurfaka perspektivo, li demonstracias, argumentas, bataladas por la plej raciaj, ĝustaj aktualaj solvoj; oni povas paroli pri li kiel pri profesoro kaj fakestro, kiu dum 35-jara universitata agado formis multajn junulajn generaciojn. El liaj estintaj studentoj multaj okupas nun altajn sciencajn kaj sociajn poziciojn. Oni povas paroli pri li kiel pri aktiva ĵurnalisto, kiel pri iniciatinto de sociaj demarŝoj ktp. Ĉu tamen, post tiom da agadoj kaj diversaj sociaj funkcioj, oni trovas tempon por Esperanto, kiel nura kromlaboro? Jes.

Ni, esperantistoj, estas ĝojaj kaj fieraj ke prof. I. F. Bociort estas inter ni, pli precize **antaŭ ni,** ke li metis sian sciencan, profesian kaj socian prestiĝon siajn kapablojn kaj plurlingvajn konojn, siajn batalantan karakteron, entuziasmon kaj nelacigeblan persistemon ankaŭ en la servon de Esperanto.

Li esperantistiĝis fakte en Berlino (do, Detlev Blanke kaj lia biblioteko kulpas), kie inter 1965 — 1970 li funkciis kiel universitata gastdocento. Post la reveno en la landon, prof. Bociort, kiel ano de la gvidantaro de universitataj, kulturaj kaj ĵurnalistaj forumoj iniciatis multajn kaj gravajn poresperantajn paŝojn. Ne eblas priskribi ĉion kion li faris en pli ol 15 jaroj por atingi (iufoje en relative mallonga tempo) antaŭe por la malnovaj esperantistoj kvazaŭ neimageblajn rezultojn. Ni mencios kelkajn el la plej gravaj, celante per tio montri ankaŭ la rumanan modelon de Esperanto-agado en la nuntempo:

1. Prof. I. F. Bociort komencis aktivan informadon pri Esperanto en sciencaj, ministeriaj, ĵurnalistaj kaj politikaj medioj. Oni kontaktis persone, buŝe aŭ skribe kelkdekojn da superuloj; ne malofte iuj sincere agnoskis, ke ili „nun ekzakte komprenas" la pravecon kaj la multflankecon de Internacia Lingvo, promesis kaj donis helpon. Grava atingo de ĉi tiu agado estis la varbado de novaj grandvaloraj kunlaborantoj inter kiuj elstaras d-ro Docento Cezar Apreotesei. Oni estigis fortan grupon de sciencistoj, precipe universitatanoj el diversaj urboj, kaj oni kontaktis en mallonga tempo plurajn kulturajn institucionjn tutlandajn, distriktajn kaj urbajn, oni organizis gravajn sciencajn aranĝojn, sciencajn komunikaĵojn kaj prelegojn en pluraj universitatoj, antaŭ la profesoroj kaj studentoj, oni parolis pri la ideo en pluraj lernejoj, urbaj bibliotekoj kaj kulturdomoj. Prof. Bociort mem faris pli ol 30 prelegojn. Unu grava rezulto de tio estas la malkovro de multaj kleraj kaj seriozaj homoj, pretaj por Esperanto-agado.

2. Li iniciatis tre efikan kampanjon por Esperanto (en la lastaj jaroj eĉ tre intensan) en la revuoj kaj ĵurnaloj. Post jardekoj da silento kaj miskompreno, prof. Bociort sukcesis aperigi altnivelan artikolon (la 1-an de aŭgusto 1975) en „Contemporanul" (ĉefa tutlanda revuo de la Ministerio pri Kulturo), tuj poste studon en „Forum" (ĉefa revuo de la Ministerio por supera klerigado) poste intervjuon en „Flacăra" (la plej eldonkvanta

revuo en la lando) kaj en aliaj rumanlingvaj, hungarlingvaj kaj germanlingvaj revuoj kaj jurnaloj. D-ro Apreotesei (la plej aktiva kunlaboranto), d-ro H. Gehl, d-ro Romeo Poenaru, prof. d-ro G. Ţepolea, prof. d-ro G. Bulgăr, univ. asist. d-ro C. Dominte, univ. asist. Ioana Prioteasa k. a. aktive partoprenis ĉi tiun kampanjon en gazetoj kaj radio.

3. Kiel membro de scienca konsilantaro de Centro pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj (en Timişoara), prof. Bociort sukcesis post pluraj kontaktoj kaj per kunlaboro de aliaj novaj kaj malnovaj esperantistoj estigi (la 29-an de majo 1979) la unuan oficialan agadformon de Esperanto en Rumanio: la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko kadre de la Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Centro de ĉi-tiu tutlanda scienca kolektivo estas la urbo Timişoara kaj la estro iĝis prof. Bociort, kiu jam ekde 1978 estis ĉefo de la antaŭa Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato. La kreo de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko havis plurajn gravajn sekvojn:

a) oni povis grandprestiĝe interveni por organizi esperantajn kursojn en popolaj universitatoj (en la urbo Timişoara, ekzemple, ekfunkciis paralele 5 — 8 tiaj kursoj);
b) oni povis kontakti persone oficialajn instituciojn por organizi varbajn agadojn kaj informadojn;
c) oni povis organizi ĉiujare en Timişoara tutlandajn renkontiĝojn (kiuj iĝis veraj mikrokongresoj de esperantistoj el ĉiuj generacioj), kio donis al Esperanto-agado unuiĝon ,klarajn celojn, ĉiam pli altan sciencan nivelon, enkondukis la lingvon en kulturajn programojn ktp.;
d) enkondukis esperantologion kaj interlingvistikon kiel egalrajtajn branĉojn en sciencajn oficialajn esplorojn kaj ebligis organizi junajn esploristojn kaj studentojn en koncernajn kolektivojn. Ĉi tie formiĝis junaj tre kapablaj kaj entuziasmaj kunlaborantoj de prof. Bociort: Mioara-Lacrima Dobre, Dorin Cesma, Dorin Hehn, Karin Dodu, Iosefina Balath, Aurora Bute kaj multaj aliaj;
e) oni povis organizi sciencajn sesiojn kaj debatojn pri la rolo kaj la loko de Esperanto en la nuntempa mondo.
Tiajn debatojn, kutime gvidatajn de prof. Bociort mem, partoprenis universitatanoj, diversfakaj sciencistoj, multaj studentoj kaj iĝis modelo de fruktodona, libera kaj altnivela debato pri aktualaj problemoj;
f) oni intervenis oficiale por igi aboneblaj la esperantlingvajn revuojn el socialismaj landoj, kio, per la rektaj kontaktoj de C. Dominte en Bukareŝto, iĝis realajo en 1980.

4. Partoprenante en aŭgusto 1978 gravan ministerian forumon, prof. Bociort antaŭpreparis la vojon kaj konvinke argumentis por la enkonduko de Esperanto en la supera klerigado. Per la subteno de aliaj siaj kolegoj ĉeestantaj, oni enkondukis Esperanton kiel nedevigan studobjekton en la filologiajn fakultatojn. La studado daŭras tri jarojn po du horoj semajne; la kvalifikaj notoj de la studentoj validas samkiel la notoj al ĉiuj aliaj studobjektoj. La kurson rajtas viziti studentoj de ĉiu ajn fakultato. Tiu ĉi grava sukceso ebligis aliajn atingojn:

a) instrui Esperanton al la juna generacio de liceaj instruistoj kaj de aliaj Intelektularaj tavoloj. En la Universitato de Timişoara, prof. Bociort prenis sur sin la ŝarĝon fari ĉi tiun kurson, kaj tiel naskiĝis kelkaj serioj de bonaj (kaj junaj!) esperantistoj;
b) Aperigi Esperanto-lernolibrojn, vortarojn kaj aliajn lernilojn en universitataj eldonejoj. Prof. Bociort (poste helpita de siaj antaŭaj gelernantoj, kiuj iĝis kunaŭtoroj), aperigis (sen materiala profito) **Lucrări practice de esperanto-interlingvistica** (du eldonoj), **Curs de gramatica limbii esperanto** (tri eldonoj), **Curs elementar de Esperanto** kune kun Mioara Dobre (kvar eldonoj), **Scienca Esperantologio.** Malgranda kolektivo, gvidata de li, verkas Grandan Esperantan-Rumanan kaj Rumanan-Esperantan vortarojn. Estas en preparo **Esperanto per praktikaj ekzercoj.** La menciitaj vortaroj estas programitaj en la kvinjara plano de la Universitato kaj de la nomita Akademio. Esperantaj-Rumanaj kaj Rumanaj-Esperantaj vortaroj aperis ankaŭ en la Universitato de Bukareŝto (la laboron gvidis univ. asist d-ro C. Dominte). Prof. Bociort iniciatis ankaŭ la esperantlingvan serion de sciencaj komunikajoj pri literaturteorio, el kiuj aperis jam la numeroj 1 kaj 2.
c) Post la oficiala enkonduko de Esperanto-kurso en la supera klerigado, prof. Bociort, kiel prezidanto de la Literatura sekcio de Tutlanda Societo pri Filologiaj Sciencoj, sukcesis estigi apartan sekcion pri Esperanto kaj interlingvistiko de ĉi tiu Societo. (Al ĉi tiu societo apartenas fakte ĉiuj instruistoj kaj profesoroj de la lando.) Tiel, oni rajtis organizi Esperanto-kursojn en la lernejoj ĉiugradaj kaj meti la Esperantan sciencan agadon en diversaj urboj sub la gvidon de altprestiĝa Filologia Societo.
d) Aperigi esperantlingvajn resumojn kaj artikolojn en la sciencaj periodajoj de la universitatoj. En Timişoara, junaj sciencistoj kaj studentoj aperigis pli ol 30 sciencajn laborajojn.
e) Organizi esperantologiajn sekciojn en la ĉiujaraj sciencaj sesioj de la Universitatoj. En Timişoara, prof. Bociort, docento Cezar Apreotesei, d-ro Hans Gehl, d-ro Romeo Poenaru, docentino Minerva Bocsa, d-ro Sergiu Drincu, univ. asist. Gertrude Schmidt k. a. helpis al la studentoj prezenti ĉirkaŭ 240 komunikajojn. Esperanto estis iufoje la plej riĉa sekcio. Oni metis je dispono de la kolektivo pri Esperanto apartan salonon (por laboratorio, biblioteko, klubo) en la Universitato de Timişoara.

5. La rilatoj de prof. Bociort en la jurnalistaj forumoj ebligis la aperon en 1978 de la unua esperantlingva eldono de la revuo „Ferioj en Rumanio" kaj, en 1984, per la klopodoj de docento C. Apreatesei, la dua eldono (ambaŭ tradukitaj de Bukareŝta kolektivo gvidata de univ. asist. C. Dominte). La traduka kolektivo, sub la sama gvido, komencis la laboron por Rumana Antologio.

Docento d-ro Istvan Szerdahelyi — 60-jara

La 20an de aŭgusto 1984 fariĝis 60-jara la konata interlingvisto kaj pedagogo, d-ro Istvan Szerdahelyi, docento komence por Esperanto-lingvo kaj literaturo kaj nun por interlingvistiko/esperantologio en la Eötvös-Lorand-Universitato Budapest. Antaŭ 18 jaroj oni nomumis la jubileulon gvidanto de la komence provizora kaj poste definitiva fako en la universitato. Entute ĉirkaŭ 100 studentoj, ankaŭ el la eksterlando diplomiĝis ĉe li pri esperantologio, Kelkaj eĉ doktoriĝis. Istvan Szerdahelyi verkis serion da universitataj lernolibroj, Esperanto-kursojn, sennombrajn artikolojn pri interlingvistiko, esperantologio kaj instrumetodiko. Malpli konata estas la fakto, ke li ankaŭ elstaras kiel metodikisto de la rusa lingvo kaj verkis kelkajn lernolibrojn pri la rusa por hungaraj mezlernejoj. La jubileulo povas retrorigardi al multaj konsiderindaj sukcesoj. Diversaj liaj studoj ankaŭ aperis en „der esperantist" kaj en la antologio „La internacia lingvo — sciencaj aspektoj" Berlin, 1979. En 1978 li partoprenis sciencan seminarion en Ahrenshoop. Oni povas diri, ke la áktualaj internaciaj interlingvistikaj, esperantologiaj kaj metodikaj sciencaj aktivecoj estas grave influitaj kaj daŭre influataj de d-ro Szerdahelyi. Lia persona kontribuo al la evoluo de tiuj fakoj estas konsiderinda kaj grava. Multaj junaj kaj malpli junaj interlingvistoj estis de li influitaj, lernis de li aŭ devis atenti kaj kreive okupiĝi pri liaj tezoj kaj esploroj. Sendube jam nun eblas diri,, ke en la historio de la interlingvistika scienco la nomo Szerdahelyi havos gravan lokon. Liaj amikoj kaj kolegoj el GDR deziras al li pluajn sukcesojn en la scienca agado, aparte sanon kaj bonfarton.

D. Blanke

Ni aldonu, ke prof. Bociort mem tradukis sciencajn artikolojn kaj kelkajn literaturajojn — el kiuj unu ricevis internacian premion. Ĉu tia lingva nivelo ne multe parolas pri homo kiu lernis Esperanton kiel pli ol kvardekjaraĝa sciencisto? Li ĉiam asertas, ke oni devas ne nur propagandi la lingvon, sed mem lerni kaj apliki ĝin.

Ni, rumanaj esperantistoj de ĉiuj generacioj ne povas diri kiel aspektus hodiaŭ la Esperanto-agado en nia lando sen la prema interveno kaj konstanta ĉeesto de la nun sesdekjarulo, prof. Bociort. Nia agado multege progresis, precipe inter la junularo, unuiĝis, scienciĝis, disvolviĝis multflanke en spirito de seriozeco, pasio, entuziasmo. Ne ĉiu kapablas fari tian grandegan idealisman kroman laboron, ne ĉiu estas kapabla je tia sindonemo. Ni tre bone konscias, ke tiom da kromlaboro prof. Bociort ne malkare pagis: ĝi kostis tempon, energion, multe da mono, eble eĉ sanon. Ricevu li nian tutkoran dankon kaj gratulon! Nia **honora prezidanto** ne nur honoras, li vigle agas, ĉeestas ĉiujn iniciatojn, skribas, parolas pri Esperanto, persone intervenas ĉie kie aperas obstakloj — ĉu teoriaj, ĉu organizaj. Ni rajtas aserti, ke tia agado validas kiel modelo de sukcesa Esperanto- agado. La rumana esperantistaro elkore deziras al prof. d-ro I. F. Bociort sanon, pliajn sukcesojn kaj multajn feliĉajn jarojn!

prof. Aurel Boia

Kelkaj personaj rimarkoj

Jes, mi tre bone memoras, kiam iam en la Esperanto- Klubo en la Berlina kvartalo Prenzlauer Berg, aperis nekonatulo, interesiĝanta pri Esperanto. Verŝajne 1969. Mi ne sciis, ke tiu nekonatulo fariĝos la motoro de la moderna rumana Esperanto-movado. Ekde tiu tago ni ofte havis kontakton. Kaj kiam prof. Bociort reiris al Rumanio, li ofte revenis al Berlin, ankaŭ pro privataj kaŭzoj.
Ĉiam por mi estis aparta ĝojo sperti tiun grandan entuziasmon por scienca vero, tiun klaran penson kaj multflankan scion. La venkendaj problemoj ofte ne estis malgrandaj por la profesoro. Sed per impeto propra al li, li ilin venkis.
Mi esperas, ke venos tempo de pli oftaj vizitoj en Berlin. Sed aparte mi deziras sanon kaj feliĉan estonton.

Detlev Blanke

Junulara Klubo

En Halle fondiĝis junulara klubo de Libera Germana Junularo. La Esperanto-rondeto de junaj membroj de GDREA en Halle kunlaboras en tiu klubo, kiu troviĝas en Halle-Silberhöhe. La sama grupo ankaŭ kunlaboras en dua klubo, kiu troviĝas en moderna belega kinejo en la centro de la urbo. Eble, tiel esperas la junaj esperantistoj el Halle, tiu duflanka kunlaboro rezultigos la kreiĝon de dua esperantista grupo. Kiu volas subteni la laŭdindan aktivecon de la klubanoj skribu al Esperanto-Rondeto Jugend klub „Prisma", 4090 Halle-Neustadt, Block 005.

Rudolf Hahlbohm 75-jara

Li estas multflanka, vigla, entreprenema, la jubileulo Rudolf Hahlbohm, kiu festos la 2an de januaro 1985 sian 75an naskiĝtagon. Li apartenas al la fondintoj de la nova Esperanto-movado en GDR, en la jaro 1965.
Post la morto de Rudi Graetz li elektiĝis prezidanto de Centra Laborrondo en Kulturligo kaj nun laboras kiel vicprezidanto de GDREA. Grafikisto, diplomita teatrosciencisto, muzea konservatoro — jen kelkaj profesioj. Ĉe Rudolf Hahlbohm oni neniam certas, ĉu ne estas pliaj profesioj. Li specialistas pri fotoaparatoj, mem tre multe pentras, estas granda akvoturisto, bona historiisto kaj muzeologo. Jam trian fojon li gvidis la internacian esperantistan renkontiĝon ĉe Krossinsee ĉe Berlin. Dum la vivo grandan rolon ludis la pupoj. Dum multaj jaroj li mem gvidis pupteatron kaj estis GDR-reprezentanto en la Internacia Unuiĝo de Pupteatristoj (UNIMA). Pupoj de li faritaj ne malmultas. Ni ĝojas pri lia laboremo, entreprenemo kaj sano. Ĉio daŭru ankaŭ estonte. Elkorajn gratulojn al nia vicprezidanto!

CE de GDREA

KIK '84

Kio estas „KIK"? Jen, Konstanta Internacia Kvalifikejo. Kiu kvalifikas kiun kaj pro kio? Nu jen. La ĉiujare okazantaj Konsultiĝoj de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj jam longe konscias pri tio, ke la faka, movada kaj ofte ankaŭ politika scio de la aktivuloj de iliaj asocioj devus esti pli alta por vere kompetente kaj efike kunlabori en la internacia Esperanto-movado ĝenerale kaj aparte inter la socialismaj landoj. Pro tio la konsultiĝoj debatis la planon organizi serion de altnivelaj seminarioj. Bulgara Esperanto-Asocio disponanta pri bonegaj teknikaj kondiĉoj por tiaj internaciaj seminarioj dankinde prenis sur sin la taskon organizi la seminariojn por la nuna periodo. Tiel 1983 okazis 14-taga kurso en Varna. Ĝin gvidis kiel gastlektoroj Milan Zvara (gvidanto de la seminario) kaj d-ro Vlastimil Novobilský. Krome prelegis elstaraj bulgaraj lektoroj. Partoprenis tiam 45 aktivuloj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando kaj Vjetnamio.

Ĉi-jare KIK'84, do la dua kurso, okazis en la belega Internacia Esperanto-Kursejo Pisanica, dum la 3a ĝis 12a de septembro 1984. Eksterlandaj lektoroj estis el GDR d-ro Detlev Blanke (gvidanto de la seminario) kaj Wera Dehler. Partoprenis 27 oficiale nomumitaj KIK-seminarianoj el Bulgario, ĈSSR, GDR kaj Hungario. Krome ĉe kelkaj prelegoj aldone ĉeestis inter 5 — 10 gastoj. La programo estis tre varia. Antaŭtagmeze oni aŭskultis prelegojn kaj seminariis. Ĝenerale la posttagmezo estis libera aŭ ekskursa. La vesperoj estis liberaj aŭ ofertis libervolajn prelegojn. Do, KIK ne nur estis kvalifika seminario sed lasis sufiĉe da tempo por ĝui la unikan belecon de la Rodopi-montaro kaj ekskursi al Smoljan, la vintra kuracloko Pamporovo, al folklora centro en la montaro, en la ĉirkaŭon de Pisanica mem. Kompreneble la kursanoj ankaŭ digne omaĝis per prelegoj al la festotago de Bulgario, la 40a datreveno de la fondiĝo de la socialisma Bulgario, kiu okazis la 9an de septembro. Sed pri la programo mem:

Nikola Aleksiev, heroo de socialisma laboro kaj Honora Prezidanto de MEM, prelegis pri aktualaj problemoj kaj tendencoj de la internaciaj politikaj rilatoj influantaj la eblecojn de kunlaboro inter ŝtataj kaj neŝstataj internaciaj organizaĵoj. Li krome montris la rolon de Esperanto en la pacbatalo kaj skizis la historion de laborista Esperanto-movado, kies bulgaran alon (BuLEA) li mem kunfondis en la jaro 1929. La Ĝenerala Sekretario de Bulgara Esperanto-Asocio, lektoro por Esperanto en la Universitato Sofio, Kunĉo Valev, prelegis pri bazaj trajtoj de la historio de la Esperanto-movado kaj krome donis superrigardon pri la biografio de Zamenhof.

Pri problemoj de la publika laborado por Esperanto kaj pri eblecoj de sociutila apliko de Esperanto prelegis Donĉo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto" kaj specialisto pri dokumentfilmoj. Marin Bacev, ĉefmetodikisto ĉe BEA kaj instruisto de la germana lingvo, elstarigis en sia prelego la pedagogiajn valorojn de Esperanto. Jordan Angelov, membro de la prezidio de BEA kaj prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Plovdiv tuŝis problemojn de la elekto, pretigado kaj kvalifikado de kadroj (= funkciuloj), donis ekzemplojn pri efika varbado kaj aparte informis pri specialaĵoj de la Esperanto-movado en Bulgario. Wera Dehler, membro de la Centra Estraro de GDREA, iniciatinto de la Terminologia Sekcio (TeS) ĉe Scienceldona Centro (SEC) de UEA en Budapest, prelegis pri kondiĉoj de publika libera parolado kaj donis metodikajn ekzercojn por helpi laŭajn fiziologiajn procezojn. Ŝi krome prezentis konsiderojn pri la preferinda Esperanto-prononcado, resumis la situacion de la faka apliko de Esperanto kaj de la fakaj Esperanto-organizaĵoj kaj in-

tancoj. Ŝi traktis la evoluon kaj aktualan internacian situacion de la terminologia normigado kaj aparte montris la problemojn de terminologiaj aktivecoj en Esperanto. D-ro Detlev Blanke, sekretario de GDREA, en siaj prelegoj skizis la rilatojn inter marksismo-leninismo kaj la problemo de internacia lingvo, traktis specifaĵojn de la Esperanto-movado sub socialismaj kondiĉoj kaj montris problemojn de la kunlaboro. Li donis informojn pri la rilatoj inter UEA kaj UN/UNESKO, traktis la objektojn, problemojn kaj la internacian situacion de interlingvistiko kaj esperantologio. La preleginto ankaŭ skizis la historion de la plej gravaj planlingvaj projektoj kaj semiplanlingvoj (Volapuko, Latino sine flexione, Ido, Interlingue, Interlingua) kaj tiris konkludojn el ilia sorto.

Li ankaŭ skizis la internacian situacion de UEA, TEJO, MEM, SAT kaj NEM, montrante iliajn ideologian aŭ movadopolitikan profilojn. D-ro Blanke krome prelegis pri problemoj de kontaktado inter esperantistaj kaj neesperantistaj tavoloj kaj montris ofte renkontatajn erarojn en la varbado por Esperanto.

Vespere docento Dimov el Varna prezentis diapozitivojn pri Islando, Finnlando kaj Pollando. Ĉiuvespere la baro funkciis je la kontento de ĉiuj.

Kompreneble ĉe la fino de la seminario estis „ekzamenoj", sed de nova tipo. En ĉeesto de ĉiuj seminarianoj ĉiu devis prezenti 5-minutan liberan prelegeton (nur laŭ notoj) pri iu vere nova kaj interesa temo. Post tio la seminarianoj kaj la du lektoroj rapide starigis al la preleginto plej diversajn demandojn, kiujn li/ŝi devis kompreni kaj bone respondi. La lektoroj ĉion ĉi prijuĝis laŭ diversaj kriterioj: libera prezento, enhavo, lingva ĝusteco, stilo, prononco, respondkapablo k. s. Fakte tio estis vera ekzameno kaj montris tre gravajn niveldiferencojn. Sed ĉiuj profitis, lernis kompreneble ankaŭ la lektoroj. Ĉiu partopreninto ricevis en ĉeesto de Dimitar Papazov, sekretario de BEA, diplomojn (partoprenatestiloj). La etoso dum KIK'84 estis bonega. Multaj utilaj rilatoj nodiĝis, utile ankaŭ por la kunlaboro inter la Esperanto-organizajoj de la socialismaj landoj kaj stimulige por pli efika kunagado en la nacia kaj internacia Esperanto-movado.

La partoprenantoj el GDR, krom la du lektoroj ankaŭ la seminarianoj Erhard kaj Christel Kraus, Elizabet Boller, Hans Hofmann kaj Astrid Weller estis tre kontentaj pri la varia, laboriga kaj ripoziga KIK'84. Aparte ili dankas al la Estraro de BEA kaj al la gvidantaro de la Internacia Esperanto-Lernejo (IEL) en Pisanica pro la bonegaj laborkondiĉoj. Menciindas precipe la direktorino de IEL, s-ino Toleva, la senlaca ĉiĉerono kaj „knabo por ĉio" Ivan Perfelov kaj Kalinka Vasileva de la sekretariato de BEA La Tria KIK, do KIK'85 okazos en Varna, ĉe la Nigra Maro. La kostoj estos ĉirkaŭ 200 levoj plus vojaĝkostoj. Partopreno nur eblas post akcepto flanke de la landa asocio. Do ĉiuj interesuloj, ankaŭ el Soveta Unio kaj Pollando, jam nun kontaktu siajn ĉefajn estrarojn por certigi al si la partopreneblecon.

TRADUK-KONKURSO 6/84

Raumfahrttchenik

Sämtliche bisher verwendeten Raumtransportsysteme entsprechen dem gleichen Aufbauschema und Funtkionsprinzip. Sie transportieren Nutzmassen unter Verwendung eines ein- oder mehrstufigen Rückstoßantriebes. Dieser funktioniert völlig autonom, also unabhängig von seiner Umgebung. Aus mitgeführten festen oder flüssigen Treibstoffen entstehen durch thermochemische Reaktionen in einer Brennkammer heiße Verbrennungsgase, die über eine Ausströmdüse als gerichteter Gasstrahl ins Freie gelangen. Der Rückstoßimpuls dieses Gasstrahls liefert die Vortriebskraft. Solche seit Jahrhunderten bekannten Transportmittel werden als Raketen bezeichnet, der Antrieb selbst dementsprechend als Raketenantrieb.

Raumtransportsysteme, deren Startantrieb nach dem vorgenannten thermochemischen Prinzip funktioniert, werden noch für längere Zeit die einzigen bleiben, mit denen man Nutzmassen unterschiedlicher Größe von der Erdoberfläche in den Weltraum befördert. Aber auch kernenergetische Raumfahrtantriebe befinden sich schon in der Entwicklung.

Ein für die Ökonomie von Raumfahrtunternehmen sehr wesentlicher Aspekt der thermochemischen Raketenantriebe ist folgender. Ihre klassische oder, wenn man so will, konventionelle Konstruktion als mehrstufige Trägerrakete schließt ein, daß jedes dieser Transportsysteme nur einmal verwendet werden kann. Jede der Antriebsstufen ist ein in sich abgeschlossenes technisches System. Die ersten zwei oder drei Stufen einer Mehrstufenrakete stürzen nach Beendigung ihrer Antriebsfunktion zur Erdoberfläche zurück, wobei sie durch aerodynamische Kräfte und Aufschlag zerstört werden. Die letzte Antriebsstufe kann, zusammen mit der Nutzmasse, ebenfalls in die jeweilige astronautische Freiflugbahn gelangen. Eine zerstörungsfreie Rückführung der unteren Stufen wäre wegen des großen zusätzlichen Aufwands (Abstiegsbremsung, Fallschirmbergung) ökonomisch sehr unvorteilhaft. Dieses Verfahren der Einweg-Nutzung hat den konventionellen Trägerraketen der Raumfahrt auch die etwas saloppe Bezeichnung „Wegwerfraketen" eingetragen. Man kann unter Beibehaltung des thermochemischen Raketenantriebs, aber mit anderen konstruktiven Lösungen dieses Einweg-Verfahren umgehen.

(Aus H. Mielke: Raumfahrt heute)

Plibonigu la klubvesperojn!

Sed kiamaniere? La ĉefkuiristo rekomendas:
Oni prenu sufiĉe da fantazio, kelkajn novajn ideojn, pinĉprenon da spritaĵo kaj bone miksu la tuton. Laŭplaĉe oni ornamu per muziko kaj specigu per humoraj ludoj.

L. L. Zamenhof

(Redaktas: Dieter Berndt, 1020 Berlin, Berolinastr. 2)
En tiu ĉi jaro ni rememoras la 125-an datrevenon (Jahrestag) de la naskiĝo de L. L. Zamenhof.
Jen kelkaj fragmentoj (Auszüge) el la libro de Maria Ziolkowska: „Doktoro Esperanto".

Malfrue vespere, la 15-an de decembro en la jaro 1859 al juna edziĝparo, Rozalia, naskita Sofer kaj Marko Zamenhof, naskiĝis filo. Babilulinoj (Klatschbase) kolektiĝintaj ĉe la lito de la feliĉa patrino ne aŭguris (wahrsagen) al la tro malfortika ĵusnaskito (ĵus-nask-it-o) brilajn horoskopojn. Marko Zamenhof, dudek du-aĝa instruisto en unuklasa lernejo tamen ne tro zorgis diference de sia je du jaroj pli juna edzino pri aŭguroj de la najbarinoj. Okazis tio en Bjalistoko, negranda urbo, kuŝanta tuj post la nordorienta limo de la Pola Reĝlando.
... Verda, ligna dometo de Zamenhofoj staris ĉe angulo de stratoj Zielona kaj Biala. Ĝi estis malbela kun malgranda kota (schmutzig) korteto, dividita de la aliaj per barilo (Zaun) pli simbola ol materia. Kiel ornamaĵo (Schmuck) de tiu ĉi korteto servis acero (Ahorn) ĉiujare tro frue foliseni-gita (foli-sen-ig-it-a) de raŭpoj.
... Ĝuste en tiu ĉi dometo forpasis infaneco de la juna Zamenhof, al kiu oni donis du antaŭnomojn Ludoviko Lazaro. Malgraŭ la malkvieta (unruhig) kaj malfacila tempo de la januara ribelo, ĝi tamen ne estis malgaja infaneco. Neniu vere rimarkis en Ludoviko signojn de granda homo, kiam en sia animo de la unua tago vidis la patrino. Eĉ scipovo uzi kelkajn lingvojn: polan, judan, rusan, blankrusan kaj germanan en la kvina vivjaro en la naska Bjalistoko ne indis (wert sein) lin fari mirakla infano (Wunderkind). Kono de fremdaj lingvoj en proporcia skalo al la bezonoj ŝajnis io natura, kvankam ne ofta, ĉe infanoj laĝantaj en diverslingva medio (Umgebung, Milieu). Sed sinjorino Rozalia opiniis, ke la filo havas nekutimajn kapablojn. Ludoviko vere superis sian ĉirkaŭantaron (ĉirkaŭ-ant-ar-o) per kono de fremdaj lingvoj, kiujn li uzis tre volonte.
... En Bjalistoko oni uzis diversajn lingvojn: la polan uzis ĉefe inteligentularo (inteligent-ul-ar-o). En la metiista (Handwerker) urboparto regis la germana. En la komerca kvartalo – la juda. Alveturantaj al la bazaro vilaĝanoj parolis prefere blankruse. La rusa estis ĉi tie la ofica lingvo.

Tasko –
Okaze de la jubileo vi certe ion legis aŭ aŭdis pri Zamenhof. Bonvolu respondi jenajn demandojn. Viajn respondojn mi atendas ĝis du monatoj post la apero de tiu ĉi numero.
1) Kiom da infanoj havis Zamenhof?
2) Kiu estis la lasta Universala Kongreso, kiun Zamenhof partoprenis?
3) Ĉu Zamenhof estis fumanto?

En la unua numero de „legu kaj lernu" ni serĉis bestojn, kiujn ni devis ekkoni laŭ iliaj voĉoj. Jen la respondo: abelo, vespo, muŝo zumas; cikonio (Storch) klakas; ĉevalo henas; elefanto trumpetas; korvo (Rabe) kaj korniko (Krähe) grakas; kolombo rukulas; mevo krias; aiaŭdo (Lerche) aŭ najtingalo kantas; grilo ĉirpas; serpento (Schlange) siblas; ansero gakas; kokino klukas.

Ni kore gratulas

— al s-ro Gennert el Berlin, kiu fariĝis 80-jara la 23-an de oktobro 1984
— al Rolf Bethke el Karl-Marx-Stadt, kiu dum oktobro 1984 distingiĝis per la Johannes-R.-Becher-Medalo en Arĝento.

(Fortsetzung von S. 139)

2.3. Esperanto-Treffen am Krossinsee (IREBIK 85): vom 1. — 14. 9. 1985 auf dem Internationalen Campingplatz „Intercamping Krossinsee".
Informationen bei GDREA

3. Beratungen des Zentralvorstandes
3.1. 7. — 9. 2. 1985 in Halle
3.2. 23. — 25. 5. 1985 in Magdeburg

Internacia simpozio pri strategiaj demandoj de la Esperanto-movado

okazis inter la 24a ĝis la 28a de aprilo 1984 en feria hejmo proksime de Warszawa, organizita de la ESPLORKLERIGA CENTRO de PEA. Partoprenis ĝin 52 diversnivelaj gvidantoj de la Esperanto-movado el dek landoj eŭropaj, inter ili la prezidanto de UEA, G. Maertens.

Per prelegoj, demandoj kaj debatoj ili traktis la ampleksan temon. Mi prezentos ĉi tie nur impresojn kaj instigojn el la riĉa enhavo.

La enkonduka diskuto traktis la demandon: „Esplori sin mem?". Prave oni emfazis la neceson de pli detalaj analizoj pri la Esperanto-movado, de la objektiveco, de la eklaboro de historiistoj kaj de sciencnivelaj prognozantoj. La diskutantoj diferencigis inter Esperanto-komunumo kiel uzantaro de la lingvo (konsistanta el organizitaj kaj neorganizitaj parolantoj) kaj aliflanke la Esperanto-movado, kiu krome zorgas pri la ekspansio de la komunumo per organizitaj agoj.

Walter Żelazny (Pollando) prelegis pri „Esploraj postuloj" je la ekzemplo de la okupiĝo scienca pri la vivo de Zamenhof. Li postulis la esploron de la epoko, de la scio, de la opinio pri si mem kaj de la konfliktoj, se iu esploras la pasintecon de E-movado kaj ties personecojn. Konklude li faris „salton en la klaĉon" (laŭ G. Maertens), atakinte diversajn sintenojn de UEA.

Michel Duc Goninaz (Francio) parolis pri „La socia statuso de Esperanto". Li ekzamenis la sintenojn de Zamenhof, Lanti kaj Lapenna al la demando pri la futuro de nia movado. Laŭ Zamenhof jam estus progreso, se ne plu ekzistus deviga religio kaj deviga lingvo. Lanti, pli akre, celis unu senesceptan lingvon kaj kulturon, kaj Lapenna ne prezentis kompletan teorion. Fine s-ro Duc Goninaz akceptis, ke idealoj sole ne sufiĉas, sed devas esti teorio pri nia interveno en la realajn ekzistantajn lingvajn problemojn. Estus idealismo kredi, ke ni havas la solvon, kaj ke ni nur devus atendi, kiu kaptos la solvon. Poste

d-ro Tadeusz Ejsmont (Pollando) ekzamenis la „Nuntempajn idearojn de E-o", konstatante tamen idean tendencon, funkcian kaj sintezan tendencon.

Zlatko Tišljar (Jugoslavio) havis la temon „La rolo de la E-komunumo en la homa progreso". Komencinte per difuzaj, ne sciencaj pensoj pri la historio de la homaro, li tamen atingis interesajn konkludojn, avertante, ke ni ne sekvu naciajn egoismojn aŭ la propran egoismon de la E-movado. Li predikis la sloganon: „Nenion nur por la movado, sed ĉion por la mondo".

Zsuzsa Barcsay (Hungario) akcentis la „Edukajn valorojn de E-instruado por infanoj", precipe por la edukado al interkompreniĝo, al kunlaboro, al la paco, al internacieco, al gastamo.

Baldur Ragnarsson (Islando) estis sendinta prelegon pri „Esperanto kiel antilingvo", tio estas la lingvo de subgrupo, disvolvata por aserti sian identecon enkadre de la grupo, do, la lingvajo por precipe pretendemaj intelektulaj esperantistoj.

d-ro Vilmos Benczik estis elektinta la temon: „Trajtoj kaj funkcioj de la Esperanto-kulturo", Li provis difini la nociojn E-kulturo, E-komunumo kaj E-movado kaj venis al la opinio, ke la E-komunumo estas la konstruanto kaj la konsumanto de la E-kulturo. Li vidas la funkciojn de la E-literaturo en ties lingvoekzerca, lingvoevoluiga, eduka, kaj distra karakteroj. Laŭ li, la bezono al dua lingvo en la mondo kreskas kaj la lingvaj problemoj pliakriĝas daŭre. (Aliaj kontraŭdiskutis tion!). Li asertis, ke la ekonomiaj kondiĉoj poste decidos pri la futuro de la lingvoj kaj de nia lingvo.

Dum vespera diskuto s-ro Tišljar diris, ke la E-movado estas en sakstrato, ke tro multaj nekapablaj estroj ekzistas, kiuj ne volas lasi la postenojn kaj tiel akcelas la ekeston de sektecaj grupoj, kaj pro tio li proponas la celon: E-o estu malfermita al la mondo, kaj oni serĉu eblecojn diversmaniere utili al la socio, oni poste ricevos subtenon. Kelkaj avertis, ke dum tiu servo al la socio oni ne perdu la vizaĝon. S-ro Leyk emfazis, ke ni rekomendu al la socio nur tion, kion ni vere **havas,** ne tion kion ni celas.

Linde Knöschke (GDR) parolis pri la sociologiaj aspektoj de Esperanto-movado en GDR prezentante ĉefe faktojn. En la diskuto oni konstatis, ke tiaj esploroj ege necesas por taksi nin mem.

d-ro Giorgio Silfer (Svislando) eksplikis la „Socian rolon de esperantista intelektulo". Prilumigante la historion, li konkludis, ke dum la 50aj jaroj estis bona kunlaboro inter literaturistoj kaj 70aj jaroj la intelektuloj ne volas lasi la gvidon al la simplaj verduloj. Laŭ li, okazis seniluziiĝo, ĉar Esperanto ne estas la dua lingvo de ĉiuj, sed nur la ĉefa lingvo de minoritato. Tamen la esperantistaj literaturistoj rajtus diri: „Kie ni estas, tie estas la E-kulturo". Sekvis rekomendoj, kiujn mi pli sube resumas kune kun tiuj de d-ro Leyk.

d-ro Jerzy Leyk prelegis pri „E-komunumo — paradigmoj percepti la fenomenon". Dum la iom teoria prezento, esplorante historion kaj estantecon, li eksplikis la paradigmojn: komunika, pretendenda pri kulturo, instrumenta/utileca kaj subjekta. Poste li prezentis la danĝerojn de certa servutismo al la socioj. Liaj ideoj kaj tiuj de s-ro Silfer formis tuton, ne en-tute prezentitan, sed tiel danĝeran. Mi citas la ĉefajn:

Motivoj kaj rekomendoj de la novtipa celo (laŭ J. Leyk kaj G. Silfer)

— En la E-movado, ĉiu persono pli validas kiel objekto ol kiel subjekto.
— Dum la lastaj 70 jaroj, la kresko de internaciaj kontaktoj ne estas pli alta ol la kresko de la monda loĝantaro, pro tio la problemo de la internacia komunikado ne el si mem pliakriĝas.
— La ĝisnunaj paradigmoj de la E-movado estas elĉerpitaj, eluzitaj, nome la paradigmoj pri
  — la valoro de la komunikado (kompare al teknika inventajo),
  — la kultura valoro de la interkompreniĝo inter la popoloj
  — la valoro de Esperanto por aliaj sociaj celoj („servutismo"),
  — la valoro de la subjekto (de la e-isto) por la movado

— La servutismo, t. e. la servado de la e-istoj al aliaj celoj de la socio,
  — tiras la movadon al diversaj direktoj,
  — alportas tro danĝerajn etikajn politikajn problemojn
  — kaj ne helpas nin sufiĉe forte.
— La informado pri E-o ne tiel gravas, sed gravas
  — la informado pri la E-kulturo,
  — la ekspansio de la E-kulturo
  — nur ĉerande la enkonduko de E-o en la lernejojn.
— Hodiaŭ la psikologoj anstataŭas la pastrojn, la televidiloj anstataŭas la lernejojn. Pro tio estas sensence enkonduki E-on per la lernejoj.
— La nuna E-movado (la landaj asocioj) limigas la kulturan evoluon de la unuopaj esperantistoj.
— Rekomendoj por e-istaj intelektuloj en landoj sen Esperanta pluralismo:
  — „Se la intelektuloj estas nekontentaj, ili fondu proprajn organizojn" (Leyk)
  — Fondi specifajn centrojn ekstere de la landaj asocioj (Silfer)
  — Aparteno al memelektita diasporo
  — Nur pagi por servoj, ne plu por aparteno al organizo
  — La landaj asocioj eble ne plu estas necesaj
  — UEA havu nur la funkciojn por la ekstereŭropaj kontaktoj
  — La intelektuloj povas aserti: „Kie ni estas, tie estas la kulturo"
  — Absolutan nedependecon al la intelektularo kaj junularo!
— Ne elparolita, sed fona ĉefpenso:
  Nur la liberaj, sendependaj intelektuloj kun sia kulturo savos la E-movadon el la sakstrato.

D-ro Arpad Ratkai (Hungario) parolis pri la „Deklaritaj celoj de la hungara E-movado" laŭ komparo de la diversaj historiaj statutoj. El tio sekvis la loko de la hungara E-movada en la pacmovado (de 1955), en la sindikato (ekde 1960) kaj la ĉefcelo, konsistanta el la apliko de la lingvo (ne nur ties uzo).

Ian Jackson (Britio), la prezidanto de TEJO, traktis la „Strategion de la junularo". Laŭ liaj spertoj, la junularo ĉie opinias, ke ne eblas ŝanĝi la mondon. La junularo havus certan apation, kvankam konsciante pri la estanteco, tamen ne konsciante pri la futuro. La gejunuloj enfermus sin en propraj kluboj, sed ne estas kontentaj. Ili eĉ hontus pri la ne-kontribuo al la movado. Tamen ili bone gvidas sin mem. Dezirinde estus iomete pli eduki la junulojn al la movadaj celoj, sed ĉiam kun la necesa gardemo.
Gregoire Maertens (Belgio), prezidanto de UEA, elektis unuvortan temon: „Kontinueco". Li pruvis, ke la ĉefa trajto de la E-movado devas esti la planita kontinueco. Ĉiu paŭzo, ĉiu intrerrompo en unu parto de nia movado damaĝas nin. Ni planu ĉiun aferon tiel, ke ĝi tiel longe funkciu, kiel ni bezonas ĝin.
Nikola Aleksiev (Bulgario) prelegis fundamente kaj konstruive pri la necesa strategio de la E-movado. Elirante le la faktoj de la nuna movado, li kiel unua dum la simpozio nomis prioritatajn taskojn, inkluzivante la kontribuon al la pacmovado. „Se ni ne montras al la homoj, ke ili povas esprimi siajn proprajn problemojn en Esperanto, — ĉikaze ili ne aplikos nian lingvon".
Michael Behr (GDR) en la prelego „Rilatoj de la E-komunumo al la socio" asertis kaj montris je ekzemploj, ke ekzistas la sekvaj necesoj (aŭ prioritataj taskoj) por la strategio de la E-movado:
Konscie vivi en la rolo de pioniroj, aktive kontribui al la pacmovado, akceli la faklingvojn en E-o, varbi inter celitaj homgrupoj, kunlabori kun aliaj sociaj organizaĵoj, kaj ĉefe: labori laŭplane.
Edward Symoens (Belgio) parolis pri „ekstera informado". Analizante li i. a. konstatis, ke tro multaj E-grupoj nur celas la internan kluban vivon, ke mankas disciplino, volo kaj planoj, ke estas tro akcentita la distra flanko. Mankas la kazoj, ke grupoj diverslandaj kunlaboras vere, serioze kaj samcele. Li proponis paŝojn por prepari vojojn por la posta enkonduko de E-o en la lernejojn kaj eĉ deklaris tion kiel **fincelon.** Dum la akra diskuto pri tiu deklaro montriĝis, ke tiu simpozio ne povas respondi la demandon, en kio konsistas la fincelo. Do, unu el la ĉefaj demandoj de la strategio restis nesolvita.
Resume oni devas konstati, ke la simpozio ne venis al unueca rezulto. Kontraŭe, montriĝis du iomete kontraŭaj opinioj pri la necesa strategio. El tio sekvas la urĝa neceso de plua simpozio kaj de la pli konkreta ellaboro de la imagoj pri la strategioj kaj la respektiva taktiko.
En unu punkto ĉiuj partoprenintoj havis la saman opinion: Ke estas unu el la ĉefaj celoj nepre plialtigi la kvaliton de ĉia poresperanta kaj peresperanta laboro.
Tamen restas la impreso, ke la jam nun pli konkretaj imagoj de la „strategiistoj de la kontinueco" pli multe helpos nin „ekspansiigi la movadon" ol la difuzaj imagoj de la porelita teorio. Tamen la plej bona vojo certe elkreskos el la fruktodona batalo de la kontraŭdiroj . . .

Michael Behr

Termine 1985

Bitte merken Sie sich folgende Termine für 1985 vor:

1. Seminare für Leitungskader und Mitglieder des Verbandes

1.1. Basisseminar mit Intensivkurs: 14. — 19. April 1985 in Lychen
1.2. Jugendseminar mit Intensivkurs: 3. — 8. November 1985 in Lychen
1.3. Intensivkurs mit offiziellen Prüfungen für Kursleiter an Volksschulen: 24. — 29. 11. 1985 in Lychen
1.4. Interlinguistikseminar: 10. — 14. 11. 1985 in Ahrenshoop

Anmeldungen für 1. 1. — 1. 4. beim Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes im KB der DDR, 1080 Berlin, Charlottenstr. 60.

2. Internationale Veranstaltungen in der DDR

2.1. Messetreffen (IFER'85): 8. — 10. 3. 1985 in Leipzig
Informationen bei Rolf Beau, 7010 Leipzig, Jacobstr. 9
2.2. Sommerlager (SEFT 85): 17. — 24. 8. 1985 auf dem Zeltplatz bei Thomsdorf (Feldberg/Mecklenburg)
Informationen bei Werner Pfennig, 2000 Neubrandenburg, Leibnizstr. 5/67

(Fortsetzung auf Seite 137)

Aus der Botschaft des Friedensrates der DDR

Liebe Freunde!

Der Friedensrat der Deutschen Demokratischen Republik übermittelt Ihnen anläßlich des IV. Zentralen Treffens des Esperanto-Verbandes die herzlichsten Grüße und wünscht Ihrer Beratung einen erfolgreichen Verlauf.

Das Treffen der Vertreter Ihres Verbandes findet wenige Tage vor dem 35. Jahrestag der DDR statt. In diesen dreieinhalb Jahrzehnten haben wir unser gemeinsames Vaterland zu einem starken sozialistischen Land entwickelt, das die Erhaltung des Friedens als ein Hauptanliegen seiner Politik betrachtet und die Maxime vertritt, daß nie mehr von deutschem Boden ein Krieg ausgeht.

Die weitere Stärkung der DDR ist um so wichtiger, weil gerade in der Gegenwart den Völkern durch die Hochrüstungspolitik des Imperialismus, durch die Stationierung neuer nuklearer US-Mittelstreckenraketen in Westeuropa und durch das verstärkte Bemühen der Reagan-Administration, weitere furchtbare Massenvernichtungswaffen zu entwickeln, große Gefahren erwachsen, deren Abwendung Anliegen aller Friedenskräfte ist . . .

Liebe Freunde! Wir schätzen hoch den bedeutsamen Beitrag, den die Mitglieder des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR mit ihren spezifischen Mitteln für die Propagierung des Friedensprogramms der sozialistischen Staatengemeinschaft und für die Entwicklung eines festen Bündnisses aller Rüstungsgegner leisten.

Das IV. Zentrale Treffen wird zweifellos dazu beitragen, unserem gemeinsamen Wirken für Frieden, Entspannung, Abrüstung und Völkerverständigung neue Impulse zu verleihen.

Unsere Devise ist und bleibt: Kampf für den Frieden nun erst recht!

In diesem Sinne wünschen wir allen Ihren Mitgliedern neue Erfolge in Ihrer Tätigkeit.

Friedensrat der
Deutschen Demokratischen Republik
Prof. Dr. Dr. h. c. Günther Drefahl
Präsident / Werner Rümpel, Generalsekretär

Ei la Mesaĝo de la Packonsilantaro de GDR al la IVa Centra Renkontiĝo

Estimataj amikoj!

La Packonsilantaro de Germana Demokratia Respubliko sendas al vi la plej korajn salutojn okaze de la IVa Centra Renkontiĝo de la Esperanto-Asocio dezirante al via kunsido rezultodonan pason. La Renkontiĝo de reprezentantoj de via Asocio okazas kelkajn tagojn antaŭ la 35a jubileo de GDR. Dum tiuj tri kaj duono jardekoj ni evoluigis nian komunan patrion al forta socialisma lando, kiu rigardas ĉefafero de sia politiko la konservon de la paco kaj sekvas la maksimon, ke neniam denove ekiru milito desur germana tero.

La plua fortigado de GDR estas des pli grava, ĉar nuntempe kreskas grandaj danĝeroj por la popoloj pro la altarmada politiko de la imperiismo, pro la lokigado de novaj nukleaj usonaj mezdistancaj raketoj en Okcidenta Eŭropo kaj pro la plifortigitaj klopodoj de la Reagan-administracio evoluigi pluajn terurajn amase neniigajn armilojn. La forigo de tiuj danĝeroj estas la celo de ĉiuj porpacaj fortoj.

Karaj amikoj! Ni alte taksas la signifoplenan kontribuon, kiun donas per siaj specifaj rimedoj la membroj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR por la propagandado de la pacprogramo de la socialisma ŝtata komunumo kaj por la evoluo de fortika alianco de ĉiuj kontraŭuloj de armado.

La IVa Centra Renkontiĝo sendube kontribuos por doni novajn impulsojn al niaj komunaj klopodoj por paco, malstreĉiĝo, malarmado kaj interpopola kompreniĝo.

Nia devizo estas kaj restas: Batalo por la paco, aparte nun! En ĉi-tiu senco ni deziras al ĉiuj viaj membroj novajn sukcesojn en ilia agado.

Packonsilantaro de
Germana Demokratia Respubliko
Prof. d-ro, d-ro h. c. Günter Drefahl
Prezidanto
Werner Rümpel
Ĝenerala Sekretario
Berlin, 29. septembro 1984

GDR-pioniroj en Czilleberc

Czilleberc/Budapest — Internacia Esperanto Pionira Tendaro — tio estis ekde la 2a ĝis 13a de aŭgusto 1984 la dumtempa adreso ankaŭ de 10 pioniroj kaj membroj de LGJ (FDJ)[1]) el la urboj Stralsund, Wriezen kaj Prenzlau en GDR.
Dank' al la invito de Hungara Esperanto-Asocio ni povis partopreni la duan plej grandan pioniran tendaron de Hungario. Ĝi situas en belega kverkarbaro sur la montoj de Buda. La tendaro konsistas el 6 subtendoroj. Entute tie povas ripozi samtempe pli ol 1 300 pioniroj. Tion en tiu ĉi jaro jam faris pioniroj el pli ol 20 landoj. Sed Czilleberc estas aparte tendaro por junaj specialistoj. Dum nia ĉeestado en la subtendaro „Partizan" ankaŭ partoprenis junaj sportistoj en la aliaj kvin subtendaroj. Post nia restado sekvis junaj naturamikoj.
En la Esperanto-tendaro partoprenis 137 gepioniroj el 4 landoj, el Pollando 16 knabinoj de la Esperanto-ensemblo „Rideto", el Jugoslavio, 6 pioniroj, el Hungario 105 pioniroj, kaj 10 pioniroj kaj membroj de LGJ el GDR. Ni havis treege interesan programon. Ĝi konsistis el 3-hora potaga antaŭtagmeza Esperanto-instruado, dispartigita en 6 partoj (konversacio, kantado, ludado, literaturo, recitado kaj manlaboroj).
Ankaŭ posttagmeze ĉiutage estis interesaj programeroj, i. a. sportludoj, popoldancado, banado, migrado en la belega ĉirkaŭaĵo de la tendaro, ekskursoj al Budapeŝto, veturado per la telfero kaj per pionira fervoja trajno. Vespere okazis diskotekoj, filmprezentado, pupteatro, kantado ĉe la bivakfajro, ludado, kisdancado (tre ŝatata okupiĝo!), babilado, diskutado, spertinterŝanĝo, vintrinkado (memkompreneble nur por la plenkreskuloj!).
Ni interŝanĝis adresojn, ricevis kaj donis memorajojn kaj trovis novajn geamikojn.
Tro rapide pasis la belegaj tagoj en Czilleberc, kaj dum la adiaŭa kunveno ni promesis: Ni revenos, se eble, tre baldaŭ! Koregan dankon al ĉiuj hungaraj geamikoj-helpantoj, al la Esperanto-instruistoj, pionirgvidantoj kaj sportinstruistoj! Speciale ni dankas al Istvan Nemeth kaj Ilona Hideg, al niaj tendargvidantoj. Modeste, zorgeme kaj ĉiam helpeme ili gvidis aperte kaj lerte la tendaron.

Achim kaj Edeltraud Zettier
gvidintoj de la delegacio el GDR

[1]) Libera Germana Junularo (Freie Deutsche Jugend), socialisma junulara organizo de GDR.

Pioniroj ĉe Strausberg

Ĉi-jare, de 6a ĝis 11a de aŭgusto 1984 en turisma stacio de la asocio de junpioniroj de GDR ĉe Strausberg (ĉe Straus-lago), okazis la 4a Lernanta Esperanto-Renkontiĝo. Partoprenis ĝin 42 lernantoj el 8 distriktoj. Ili lernetis Esperanton, aplikis lingvajn kaj aliajn ludojn, partoprenis konkurson pri talentulojn, renkontiĝis kun veteranoj de laborista Esperanto-movado kantis kaj kompreneble ripozis. Ili organizis vesperon kun prezentoj pri sia distrikto en Esperanto, vizitis la pionirpalacon Ernst Thälmann kaj tie vendis memfaritajojn por la solidareca fonduso. La pioniroj skribis pli ol 100 leterojn al grupo en Tallinn. Regis bonege atmosfero. La grupgvidantoj kaj kunlaborintoj, s-inoj Bastian, Behr, Hahlbohm kaj Modrak kaj s-roj Birnbaum, Ebert, Klare, Lemke kaj Wollenberg (gvidinto de la tuta aranĝo) meritas grandan dankon. Presis informojn „Neues Deutschland", „Berliner Zeitung", „BZA", „Trommel". Oni planas aranĝi la 5an Renkonton 1985.

Biciklado al SEFT

La 20an de aŭgusto 1984 startis junulara esperantista bicikla karavano nun jam la trian fojon, ĉifoje en Loissin. Temis pri 6taga tendumado. Komence partoprenis 16 gejunuloj, inter ili unu hungaro. Ĝis la fino en SEFT alvenis eĉ dudek. Certe estas multe por rakonti pri la biciklado, sed, tio plenigus apartan artikolon.
La 24an de aŭgusto ekfunkciis la Somera Esperantista Familia Tendaro, mallongita SEFT, jam la sepan fojon en la publika tendaro de Thomsdorf, kiu situas en pitoreska, arbara pejzaĝo inter du lagoj, proksime de Feldberg. La programo dum SEFT estis tute libera, sed oni tamen okazigis interesajn ekskursojn al proksimaj belaj lokoj. Oni gitarludis, kantis, rakontis ŝercojn, bierumis, sin banis kaj per alia maniero amuziĝis.
Entute oni povas diri, ke „nur" mankis eksterlandanoj. Ni estis entute pli ol 80 partoprenintoj . . ., sed nur 3 eksterlandanoj el Pollando kaj Hungario.
Finante mi dankas al la ĉeforganizinto, Werner Pfennig kaj al aliaj helpintoj por la sukcesa aranĝo. Ĝis revido en 1985.

Christian Schmitz

Junulara Esperanto-Renkonto en Hungario

JER'84 en Hungario, ĉiujare ripetiĝanta tradiciaĵo, okazis de la 6a ĝis 8a de junio 1984 en Kecskemét. Partoprenis 300 junuloj, inter ili eksterlandanoj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Jugoslavio kaj Pollando. El GDR partoprenis Roland Schindler.

„Bulgarino" 1983

Jam dum pluraj jaroj la „Komitato de Bulgaraj Virinoj" ĉiujare eldonas unu kajeron de la bulgara revuo „Bulgarino" ankaŭ en Esperanto. La lukse presita 34paĝa grandformata kajero por 1983, parte kolore ilustrita, estas tre riĉenhava. Oni trovas en ĝi artikolojn pri la socia statuso de la nuntempa bulgara virino, ŝia partopreno en la ekonomia vivo de sia ŝtato, porpaca agado, ripozado k. s. Ankaŭ enestas intervjuo kun la prezidantino de la Internacia Demokratia Virina Federacio, Frieda Brown (Aŭstralio), artikolo pri Valentina Tereŝkova, materialoj pri modo, arto kaj sporto. Ne mankas literaturo. La kajero estas ricevebla ĉe: „Bulgarino", redakcio (Esperanto-eldono), Sofia, bulv. „P. Evtimij" 82.

D. B.

IREBIK'84

La tradicia Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj ĉe Berlin sur la Internacia Kampadejo Krossinsee okazis de 2a ĝis 14a de septembro 1984. Ĉi-foje bedaŭrinde nur partoprenis 20 personoj. Kulpas la nesufiĉa informado pri la aranĝo en eksterlandaj medioj. Ankaŭ ĉi-jare estis kursoj por komencantoj kaj progresintoj kaj la kutima multflanka programo. Ankaŭ 1985 okazos IREBIK: 1. — 14. 9. 1985. Informoj petu ĉe GDREA.

10a Plenkunsido de GDREA

La 10a plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA okazis la 27an de septembro en Dresden, senpere antaŭ la Centra Renkontiĝo. La Centra Estraro aŭskultis raportojn de la distriktaj prezidantoj d-roj Hußner (Suhl) kaj Minkwitz (Dresden), diskutis detale la IVan Centran Renkontiĝon, kaj aŭskultis diversajn raportojn kaj informojn.

Esperanto dum „Laboristaj Festludoj"

Ĉi-jare, de 15. — 25. 6. 1984 en Gera okazis la „Laboristaj Festludoj de GDR", kultura aranĝo kun aparta konsidero de la popola kultura aktivado. En ties kadro la esperantistoj ekspoziciis materialon.

En la parko de Wörlitz

La 13an de oktobro 1984 renkontiĝis ĉ. 80 esperantistoj el la distrikto Halle en la fama parko de Wörlitz (ĉe Dessau) en la kadro de la „Tagoj de Kulturligo".

Ĉu organizaĵo de kolektantoj?

La internacian renkontiĝon de kolektantoj 1983 en la urbo Valtice en Ĉeĥoslovakio, partoprenis samideanoj el Ĉeĥoslovakio, Pollando, Aŭstrio, Nederlando, USSR kaj Bulgario.
La redaktoro de la revuo „Kolektanto" informis, ke multaj esperantistoj skribis al la redakcio pledante pri fondo de Internacia Sekcio de Kolektantoj. La ideo delonge estas lanĉata kaj jam maturiĝis.
Internacia Sekcio de Kolektantoj-Esperantistoj povas ludi gravan rolon en la vivo de la tutmonda esperantistaro, ĉar preskaŭ ne estas esperantisto, kiu ne kolektas ion. Ĝi povas ne nur faciligi la ligojn inter la esperantistoj; ĝi estas nesufiĉe uzata eblo por kultura interŝanĝo kaj informado pri Esperanto. Pro tio la ideo pri fondo de Internacia Sekcio devas esti serioze pripensata, pridiskutata kaj subtenata.
Ni petas viajn sugestojn kaj proponojn. Ili estos utilaj. Sendu ilin al ni.
En Valtice oni decidis, ke la gvidantoj de la sekcioj en Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio ĝeneraligu la ricevitajn opiniojn kaj utilajn propronojn por la fondo de la sekcio.
Ni atendas viajn leterojn al adreso: Bulgario — 1303 Sofio, bul. Hristo Botev 97, Revuo-Kolektanto, Redaktoro Dimitâr Denĉev.

VIII-a ITREE'85

La jam 8a Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en la Ercmontaro (GDR/ČSSR) okazos de 17a ĝis 21a de junio 1985 en Karlovy Vary/ČSSR. ITREE'85 estas dediĉita al la 40a datreveno de la liberigo de Ĉeĥoslovakio. Kiel kutime ITREE ofertas varian turismon kaj kulturan programon. ČSSR-anoj pagos 500 kaj alilandanoj 550 Kčs.
Postulu aliĝilon kaj la detalan programon ĉe Jaroslav Klement, Kpt. Nálepky 7, ČS-36004 Karlovy Vary.

Antaŭ lingvistoj en Greifswald

La 9an de oktobro 1984 d-ro Detlev Blanke prelegis antaŭ la „Grupo de lingvistoj de Greifswald" pri „Planlingvoj — lingvosciencaj aspektoj". Partoprenis 25 universitataj profesoroj, docentoj kaj asistantoj.

Recenzoj

Benedek, Elek: Hungaraj fabeloj. 2a eld. Hungara Esperanto-Asocio Budapest 1983. 70 pĝ. 40 Ft.
Senriproĉan legplezuron ofertas la „Hungaraj Fabeloj" de Elek Benedek. La dek fabeloj elektitaj kaj tradukitaj de Maria Benczik prezentas ĉion, kion distingas tiuj simplaj folklorajoj: fablostilajn bestaventurojn, feinojn kaj reĝojn, belajn reĝidinojn kaj saĝajn junulojn.

Michael Lennartz

Broŝuro de Kuznecov

De la konata konata sovetia publicisto Vladen Kuznecov jus aperis en Esperanta traduko la broŝuro „Al la nuklea epoko pacan kordon. 6 principoj de Konstantin Ĉernenko — normoj de interrilatoj de la nukleaj regnoj". La 14-paĝan broŝuron eldonis APN (Novosti), Moskvo 1984. Tre bonvena bonege presita materialo. Mendu amase ĉe Novosti, USSR-107082-Moskvo, Bolŝaja Poŝtovaja 7, Izdatelstvo APN.

Ĉernenko pri socialismo

APN (Novosti) eldonis 62-paĝan broŝuron kun 7 paroladoj aŭ mesaĝoj de K. V. Ĉernenko (Moskvo 1984) kun la titolo „Perfektigo de la evoluinta socialismo kaj lukto por la paco sur la planedo". La materialo estas bonnivela ankaŭ laŭ lingva kaj grafika vidpunktoj. Mendu amase ĉe Novosti, USSR-107082-Moskva, Bolŝaja Poĉtovaja 7, Izdatelstvo APN.

„Danco ĉirkaŭ lokomobilo"

En Estonio aperis en Esperanto romano de estona verkisto Mats Traat „Danco ĉirkaŭ lokomobilo". La baza temo de la romano estas la festo de la estonaj kampuloj en vilaĝo de la XXa jarcento.
Lia verkaro ricevis plurajn literaturajn premiojn de la Estona Respubliko. Parto de lia poezio kaj prozo estas tradukita en la rusan, germanan, finnan, bulgaran, latvan kaj aliajn lingvojn. El la estona lingvo tradukis Hillar Saha kaj Henrik Seppik. Eldonkvanto 4000.

Elmar Ratassepp

Paul Thomas / Trude Thomas

Ein Leben mit Esperanto

Im Jahr 1922, vier Jahre nach dem Ende des ersten Weltkrieges in der Zeit der schlimmsten Inflation, von der nur die ganz Alten noch etwas wissen, hörte ich zum ersten Mal von meinem Vater etwas über die internationale Sprache ESPERANTO. Er sagte mir, daß der damals junge Genosse Max Conrad, der auch heute noch unter uns lebt, die Esperantosprache gelernt habe. Ich selber hatte zwar in der Schule Englisch und Französisch gelernt, aber ich hatte auch erkannt, wie wenig mit diesen Schulkenntnissen anzufangen war. Deshalb wollte ich unbedingt ESPERANTO erlernen, um mit vielen Menschen in der ganzen Welt Kontakt aufnehmen zu können. Als im Juni 1924 im damaligen Lehrerseminar in Auerbach, einer Hochburg des ESPERANTO, ein Anfängerlehrgang begann, war ich sofort dabei, und auch meine Frau fing an, gleichzeitig Esperanto zu lernen. Schon nach den ersten zwei Lektionen schrieb ich eine Karte an einen gleichaltrigen jungen Esperantisten in Japan. Damals gab es noch keine Luftpost. Aber ich war sehr froh und stolz, als nach einigen Wochen eine Antwort aus Japan kam. Aus dieser ersten Karte entwickelte sich eine ehrliche lebenslange Freundschaft, die auch heute noch anhält. Es vergeht kein Monat, ohne daß Luftpostbriefe zwischen Auerbach und Tokio hin- und herreisen.

Leider hatten wir nicht das Geld, um uns gegenseitig zu besuchen, aber inzwischen haben wir viele Briefe, schöne Ansichtskarten und Fotos ausgetauscht. Dieser Briefwechsel wurde nur unterbrochen in der Zeit der faschistischen Diktatur, als die Esperantisten verfolgt wurden, und während des zweiten Weltkrieges. Diese erste Freundschaft war aber nur der Anfang unseres Wirkens als Esperantisten, denn rasch erwarben wir uns viele Freunde in aller Welt. Zuerst waren es viele sowjetische Freunde, denn in der SU war die Esperanto-Bewegung besonders stark. Dazu kamen Arbeiter-Esperantisten in Jugoslawien, Schweden, Österreich, Frankreich, Holland, Belgien, Dänemark. Überall gibt es fortschrittliche Esperantisten und Sozialisten. So haben wir heute auch noch viele Freunde in Polen, Ungarn, der ČSSR, aber auch in Australien, Neuseeland, in den USA, in Brasilien, Italien, Spanien, Portugal usw.

Um mit ausländischen Esperantisten wirklich zu sprechen, besuchten wir große internationale Esperantokongresse in Dänemark, Bulgarien und Ungarn und viele kleinere Zusammenkünfte mit ausländischen Esperantisten, wo wir uns mit vielen unserer Freunde treffen konnten. Aber wir besuchten auch viele unserer Freunde in diesen und anderen Ländern und lebten mit ihnen. Ebenso kamen auch unsere Esperanto-Freunde aus Frankreich, Ungarn, Polen, Bulgarien, Dänemark zu uns nach Auerbach. Dabei gab es nie irgendwelche Sprachschwierigkeiten, denn Esperanto ist gewissermaßen unsere zweite Muttersprache. Natürlich haben wir auch Esperanto-Zeitschriften und Bücher aus aller Welt. Im vergangenen Jahr erschien in der DDR ein großes Esperanto-Wörterbuch, das den aus Auerbach stammenden Dr. Erich-Dieter Krause zum Verfasser hat.

Selbst im Beruf war mir Esperanto eine wertvolle Hilfe. Ebenso konnte ich nach Kriegsende meiner Frau durch Esperantisten in neutralen Ländern mitteilen, daß ich noch lebte und in Gefangenschaft war. Meine Frau hat mit 18 Jahren mehrere Monate bei einer Esperanto-Familie in Schweden gelebt und gearbeitet. Täglich können wir interessante Esperantoprogramme aus Warschau, Wien, Bern, Rom usw. im Radio hören.

Inzwischen sind die Jahre vergangen. Im Kulturbund wurde der Esperanto-Verband gegründet, dem wir angehören. In diesem Monat können wir unser 60jähriges Jubiläum als Esperantisten begehen. ESPERANTO hat unser Leben bereichert, ihm einen wertvollen Inhalt gegeben und unseren Gesichtskreis erweitert. Wir haben viele bedeutende Menschen kennengelernt, mit denen wir ohne ESPERANTO nie zusammengekommen wären. Dafür sind wir dankbar.

(Resumo: Iama laborista esperantisto kaj lia edzino kiuj ankoraŭ hodiaŭ en GDREA estas tre aktivaj. Ili priskribas, kiel Esperanto dum 60 jaroj pliriĉigis ilian spiritan vivon.)

Recenzo

Nemere, Istvan: Febro. Hungara Esperanto-Asocio. 1984. 131 pĝ. 65 Ft.

Anna, la edzino de inĝeniero Danai, havis intimajn rilatojn al la mi-rakontanto de la nova, kvina verko de la hungara aŭtoro Nemere. Ŝi mortis, ĉu propravole, ĉu murde?, sed ŝia amiko estas konvinkita, ke la edzo mortigis ŝin. Tial li persekutas la inĝenieron, timigas lin per telefonvokoj, serĉas okazon por murda venĝo.

Nemere rakontas alterne sur du ebenoj: La realtempa ebeno priskribas la amdolorojn de la amiko, liajn farojn cele al torturado kaj pereigo de la inĝeniero. Liaj rememoroj pri la feliĉaj horoj kun Anna estas la alia ebeno.

La aŭtoro devas apliki sian tutan rakontistan talenton por eviti enuigon de la leganto. Li bone sukcesas ne banaligi la romanon. Tamen restas kelkaj romantikismaj nuancoj, ripetiĝadas aŭtoveturadoj, renkontiĝoj en restoracioj kaj kafejoj, mallongaj, misteraj telefonvokoj al li. Tio estas tre malmulte por kapti la intereson de leganto dum pli ol cent paĝoj. La surpriza fino eĉ ŝajnas al mi konstruita por ne fari la simpatian protagoniston krimulo.

Michael Lennartz

KORESPONDDEZIROJ

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Hungario

Laboristo, 31j., dez. kor. kun germanaj esp.: Stefano Farago, str. Karlo Marx 26, **2364 Oĉa**

Krisztina Szatmári, **6000 Kecskemét,** Március 15. ut. 102. V. 43, (15j.) dez. kor. kun gejunuloj

Komencanto dez. kor.: Lajos Maróti, **6793 Forráskút,** Pf. 277

Lingvo-instruisto kol. lernolibrojn el ĉiuj landoj: Vilmos Horváth, **1201 Budapest,** Attila u. 22

Gyula Logyik, **6001 Kecskemét,** Pf. 34, dez. kor.

László Géczi, Kertész ut. 128, **H-3300 Eger,** dez. kor.

Jugoslavio

Kor. dez. Melita Dendis, Bražka 117, **54000 Ozijek**

Pollando

Lernanto, 13j., dez. kor. tutmonde kun gejunuloj p. ĉ. t.:
Arkadiusz Izdebski, ul. Tetmajeva 1c/4, **80-313 Gdansk-Oliwa**

24j. kemiistino dez. kor. pri turismo, E-movado, fotografado: Grazyna Mirkiewicz, **50-501 Wrocław,** ul. Hubska 119/34

Kor. dez.:
— Kasia Batajzak, ul. Kopernika 2a/19, **63-400 Ostrów** WLKP
— Paulo Novak, Anielow, **08-405 Gończyce,** woj. Siedleckie

Soveta Unio

Kor. dez.: Džilda Juknaite (15j.), **235 250 Pasvalys,** Komjaunimo 38

Svinjina Nadejda, str. Jeleznodorojnaja 19-8, **665 706 Bratsk-6,** dez. kor. tutmonde, kol. bk pri bestoj kaj alumetaj etikedoj

31j. oficisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Vladimir Girba, **279 800 Florešti,** str. 28. junio 49-1

Geedzoj Brális, Vita kaj Guntars (23j. kaj 26j.) dez. kor. kun junaj geedzoj, **228 321 Lielvárde,** Komjaunatnes str. 29, Latva SSR

Dez. kor.:
— Monica Galill, Kooli 12-29, **202 204 Kehra,** Estonio
— Raivo Piikov, **202 532 Töwa,** Ehitaja tee 3-13
— 12j. lernantino pri sporto, kol. bk: Ruth Hindov, **200902 Tallinn,** Koondise 9—5
— 13j. lernantino pri sporto, naturo, kol. bk: Anu Pöld, **200023 Tallinn,** Lehtla 9
— 13j. lernantino pri filatelo, muziko: Liis Vaik, **200016 Tallinn,** Kaare 19

Kor. dez. novaj kursfinintoj el Estonio:
— 15j. lernantino pri sporto, lingvoj, naturo: Katrin Koor, **200016 Tallinn,** Tähe 40—6
— 15j. lernanto pri fotado, sporto, naturo: Kaido Laanjärv, **203054 Laagri,** Männimetsa 36—19
— 16j. lernantino pri sporto, naturo, kol. kalendaretojn: Katrin Kresmer, **200026 Tallinn,** Vilde tee 133—29
— 17j. lernantino pri naturo, bestoj, kol. kalendaretojn: Eve Randi, **200034 Tallinn,** Söpruse pst. 226—49

Gorjkija Esperanto-Klubo „Por la paco" kol. porpacajn materialojn en ĉiuj lingvoj tutmonde, kaj E-lernilojn en E., rusa, angla, franca lingvoj. Membroj de la klubo kor. tutmonde p. ĉ. t. Skribu al: Gorjkija E-klubo „Por la paco", **603000 Gorjkij,** poštamt, ab. ja. 47

Usono

Emerita ŝtatoficisto, fraŭlo, dez. kor. kun kuracistino, prec. el orienteŭropaj landoj, i. a. pri sanecaj temoj, vojaĝoj: Leon Montgomery, Box 932, Orlando, FL. 32802—0932

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16